Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 23 — trimonata

3/93

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

## Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

**Redaktisto:** KOVÁCS Márta

**Vic-redaktisto:** Stefan MacGILL

**Respondeca eldonanto (verantw. uitgever):** E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

**Redaktejo:** Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

**Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

# ENHAVO


LA TORRE, Maŭro, Personigitaj Malĉeaj Instru-sistemoj . . . . . 1
ROSBACH, Johan, H., Instrui kaj lernigi . . . . . 9
Praktikaj praktikoj (diversaj instruteknikaj konsiloj, konkursoj: *km*) . . . 11
NEMEC, Vladimir, Komputoraj porlernejaj programoj . . . . . 15
KURUCZ, Géza, Kial malaperas multaj varbitoj? . . . . . 16
BELOŠEVIĆ, Marija, Novaĵoj de la 78a UK kaj 27a ILEI-konferenco . . 17
MacGILL, Stefan, Nova prezidanto, UEA buĝeto, *Eventoj* . . . . . 18
CHARTERS, Duncan, Raporto pri la kongresa temo de UK . . . . . 20
BELOŠEVIĆ, Marija, Landaj sekcioj de ILEI en 1992 . . . . . 24
GLOSSOP, Ronald J., Pensoj post la 41a jarkongreso de ELNA . . . . . 28
ORELLANA-ROJAS, Atiljo, Rondvojaĝo en sudamerikaj landoj . . . 29
Novaĵetoj, Recenzoj, Ekzamenoj, Kalendareto (*smg/km*) . . . . . 32


# ESTRARO DE LA LIGO


**Prezidanto:** d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. (*Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado).*

**Vic-prezidanto:** Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

**Sekretario:** Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*

**Kasisto:** Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

**Vic-sekretario:** Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

**Membro:** D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

**Membro:** D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel, Germanio. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

**Estrara komisiito:** Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

**Estrara komisiito:** Stefan MacGill, Eso u 7 III, HU-1034 Budapest, Hungario. *Eldonado*


# PERSONIGITAJ MALĈEAJ INSTRU-SISTEMOJ


**Mauro La Torre**


**Prelego dum la Internacia Kongresa Universitato en Valencio, 1993.**

1. Tradicia kaj malĉeesta instruaj komunikadoj : kialoj kaj kieloj.
2. La lern-kontrolado: gradoj kaj konsekvencoj.
3. Lingvaj problemoj en aŭtomata verkado.

## 1. TRADICIA KAJ MALĈEESTA INSTRUAJ KOMUNIKADOJ: KIALOJ KAJ KIELOJ

### 1.1 La antaŭfakto

En nia universitato (iam Universitato 'La Sapienza', nun Tria Universitato de Romo, Italujo), pli precize en la departemento pri Eduk-sciencoj, malgranda homgrupo okupiĝas, interalie, pri malĉeesta instruado al miloj da 'studentoj'.

La afero naskiĝis ĝuste antaŭ 7 jaroj, tre malfrue kompare kun aliaj landoj. Kial? Pro du ĉefaj kialoj.

**a)** Ni estis daŭre prematai de amaso da petoj pri aranĝo de malgrandaj 'perfektigaj' kursoj por instruistoj, pri instruikaj temoj en lernejoj disaj tra la lando. La nombro de la petoj estis tiom granda, ke:

- aŭ ni okupiĝas nur pri tio;
- aŭ ili restas plejparte ne-kontentigataj;
- aŭ ni elpensas novan specon de solvo, por atingi malproksiman amason da celatoj.

**b)** Nia sperto pri la lekciado al la ordinaraj studentoj en la universitato estis jena: ofte la kursoj estas tiom amasaj (ekzemple 500 ĉeestantoj), ke malgraŭ la ŝajna senpera komunikado en la lekciejo, la studentoj laboradas tre solaj, multaj el ili eĉ ne povas viziti la lekciojn, kaj solecaj atingas la finajn ekzamenojn, kie ili vidas la unuan fojon la profesoron aŭ liajn asistantojn de proksime, kaj nur tiam ekscias ke ilia stud-maniero estas maltaŭga. Do estus interese eksperimenti novan instrumanieron, kapabla persone sekvi kaj helpi la studentojn, kiuj ne povas regule partopreni aŭ partoprenas nur amase.


Tial, pro ambaŭ diritaj kialoj, ni ekstudis teknologian sistemon, kiu kapablu instrui al malĉeaj uloj, tamen individue servante iliajn bezonojn. Tian sistemon ni ek-realigis kun 300 kursanoj antaŭ 7 jaroj, sed ankoraŭ daŭre klopodas evoluigi!

### 1.2 Komparo inter tradicia instrumaniero kaj malĉeesta

La tradicia aranĝo de instruado estas *vid-al-vida.* Tio postulas ke ĉiuj rolantoj en la instrua komunikado ĉeestu kune kaj samtempe.


Kvankam la ĵusan aserton oni devas iomete korekti, pensante ke eĉ en la tradicia instru-situacio povas roli iloj kiel lernolibroj aŭ lumbildoj, kiuj estas verkitaj en alia tempo kaj loko.

La unueco spaca kaj tempa estas ja limigo por la instru-organizado (pensu ekzemple pri loĝantoj en fora insuleto aŭ handikapuloj, aŭ pri lernuntoj kiuj je tiu horo deĵoras en sia laborejo), sed ĝi donas evidentajn avantaĝojn. Fakte jam la adjektivo 'vid-al-vida' iom indikas tiujn avantaĝojn, kiujn oni povus esprimi ankaŭ per la vortoj 'aŭd-al-aŭda', aŭ 'tuŝ-al-tuŝa, aŭ "flar-al-flara": temas pri la senpera komunikado tra la *sensaj kanaloj.*



**bildo 1: Tradicia klaso**

Kompreneble oni povus kontraŭ-argumenti je tio, dirante ke ankaŭ foraj komunikiloj, kiel presado, filmado kaj televido atingas la lernanton tra liaj sensoj: okuloj, oreloj, ktp.. tamen, en tiu kazo la komunikado estas ĉefe *unu-sencuma*, t.e. de la instruanto (aŭ aŭtoro) al la instruato.



**bildo 2: Unu-sencuma komunikado**

Ja teorie la instruato povus leteri aŭ telefoni al la aŭtoro de la instru-materialo (se tiu ankoraŭ vivas, se li estas nur unu persono, ktp.), sed tio estas nekutima kaj maltaŭga en normala instruprocezo.

En la vid-al-vida situacio la instruanto (aŭ pli ĝenerale la parolanto) dum la parolo mem vidas la vizaĝojn de la aŭskultantoj (aŭ aŭskultuntoj), kaj jam tiel, li ofte ricevas signalojn de eventuala nekompreno, de enuo aŭ de amuziĝo; tio ebligas al li, eĉ senkonscie, *alĝustigi* la direkton de sia diro, aŭ eĉ ĉiom ŝanĝi sian prezent-manieron. Fakte, ne estas novaĵo ke la maloj de la unu-sencuma komunikado estas la interparolado, la interkorespondado, k.t.p., kie pluraj uloj kune konstruas la diraĵon.

Ekzemplo de interparola instruado, klasika por la esperantistoj, estas la Ĉe-metodaj kursoj (atentu pri la majusklo!)

Se ni volas kompari la tradician instrusituacion kun la malĉeestaj instrumanieroj, ni devas distingi, almenaŭ grandskale, inter diversaj sistemoj.



a) Unue mi volas mencii sistemon, kiu apenaŭ konsidereblas kiel instrusistemo. Temas pri tiuj *gazet-vendejaj kajeraj serioj*, kiuj instruadas ion: de lingvoj ĝis pentrado kaj kuirarto. Tiuj regulaj aperaĵoj povas havi diversajn instruajn strukturojn, kiuj iras ekde la plej simplaj eroj de kunmetota enciklopedio, ĝis kvazaŭ-interaktive strukturitaj materialoj (kun klarigoj, aplikaj ekzercoj, testoj, aldonaj informoj, amuzaĵoj, k.t.p.).

b) Due ni konsideru la *klasikajn korespondajn kursojn,* bazitaj sur presaj instrumaterialoj, kaj ĝenerale akompanataj de ia korekto-sistemo por la taskoj plenumataj de la foraj kursanoj.

c) Evolua variaĵo de la antaŭa speco estas la korespondaj kursoj kun aldona livero de *aŭdaj kaj vidaj kasedoj*.

d) Kroma variaĵo estas tiu, kiu inkluzivas ankaŭ *komputilajn disketojn,* kun programaĵoj, kiujn la kursano povas memstare uzi per sia persona komputilo. Eventuale la disketo povus eĉ enteni testojn, kies respondoj oni resendu al la instrucentro.

e) Tute alispeca malĉeesta instrumaniero, estas tiu de *televidaj telekonferenco*j, kiu per tre multekostaj teknologiaj rimedoj (eĉ satelitoj) klopodas reprodukti la ecojn de la senpera instrua komunikado.

f) Laste ni listigu la instrusistemojn *komputil-regatajn,* aŭ apogataj sur *komputilaj retoj*. Temas pri vasta kategorio, kies ekzemploj iras ekde la kazo de la instrua komunikado (instruanto/lernanto aŭ lernanto/lernanto) perata de komputilegoj, ĝis la kazo, kiam la 'instruanto' estas la komputilo mem.

## 2. LA LERN-KONTROLADO: GRADOJ KAJ KONSEKVENCOJ

Instruado esence estas formo de komunikado, kun siaj apartaj celoj kaj manieroj. Sed unu el la karakterizaj ecoj de la instru-sistemoj, kompare kun aliaj komunik-sistemoj (kiel reklamado, spektaklo, amas-komunikiloj, ... ) estas la bezono kontroli la individuan efikon de sia agado. Instrusistemo bezonas scii:

**ĉu – kion – kiom la 'lernanto' lernas.**

Se vere tio estas plej grava, oni komparu la menciitajn instrumanierojn ĝuste laŭ la vidpunkto de *lern-kontrolado.*

En tradicia instrumaniero oni devas distingi du specojn de kontrolo.

1. *Implica kontrolo* konsistas el tiuj signaloj, tiuj informoj, kiuj atingas la instruanton, eĉ nevole, dum sia laboro, pri sekvoj de sia dirado kaj farado, aŭ pli ĝenerale pri nerektaj indicoj pri sukceso/malsukceso, kiujn li iel kaptas. Tia kontrolo estas rapida, malformala, ĝi ne bezonas apartajn ilojn; tamen ĝi estas maltre fidinda: trankvila vizaĝo de aŭskultanto povas signifi kompletan komprenon kaj akcepton, aŭ supozon de kompreno, aŭ ĝi povas kaŝi aliteman internan pripensadon; inverse, maltrankvila mieno povas signali nur deziron pridiskuti iun eron, aŭ komprenon kun malkonsento; k.t.p.

2. *Formala kontrolo* konsistas el testoj, ekzamenoj, aŭ objektiva observado kaj registrado de sintenoj, kun klare difinita juĝ-aparato. Memkompreneble formala kontrolo havas siajn famajn malavantaĝojn, kiel timiĝo de la ekzamenato, pretigo de taŭgaj ekzameniloj, k.t.p.. Aliflanke, bona testa kaj ekzamena sistemo povas liveri objektivajn fidindajn informojn pri la lern-procezo, kiuj estas ankaŭ tempe kaj space kompareblaj.

Tradicia ĉeesta instrusistemo povas uzi ambaŭ kontrolmanierojn. Eĉ mi dirus ke la mikso-proporcio de formala kaj implica kontrolado *kvalite karakterizas* la sistemon.


En malĉeesta sistemo la implica kontrolado:

– aŭ tute mankas;
– aŭ estas tre nerekta kaj malrapida (ekzemple ne-vendado de la periodaj eldonaĵoj aŭ ne-respondado de koresponda kursano povas esti indicoj de io kio ne fluas; sed oni devas analizi, ...);
– aŭ estas apenaŭ ekspluatebla far la instruanto (ekzemple dum iaj telekonferencoj).


En malĉeesta instruado eblas formala kontrolado, iam kun problemoj metitaj de la grand-nombreco de la kursanaroj. Ja komputiloj povas helpi en tio, sed la plej malfacilaj problemoj ĝenerale estas pli instru-sciencaj ol teknologiaj: mi volas diri ke ofte okazas ke instrusistemoj disponas pri grandiozaj tek nologiaj rimedoj, sed malabundas pri klaraj ideoj pri la didaktikaj strukturoj.

Do ni mallonge komparu iujn instru-procedurajn skemojn el la vidpunkto de lern-kontrolo, kompensado, kaj individuigo. Por simpligi, mi konsideros nur 4 ŝtupojn de kontrolo.

## 1. *Senkontrola instruado*




La unua ŝtupo estas bone ekzempligata per la pratipaj, gazetvendejaj lernkajeroj, kie oni nur klarigas la instruaĵon. Se la leganto ne komprenas, tio restos nur problemo lia. (Escepte en la kazo, kiam li decidos ne plu aĉeti la periodaĵon, ...!)







2. *Kontrola instruado sensanĝa*


En la klasikaj korespondaj kursoj, ĝenerale ekzistas ekzercaĵoj kaj testoj, pli aŭ malpli korektataj far la instrucentro.

Alternativo estas testoj kun memkorekta ŝlosilo, kaj ekzercaĵoj kun ekzempla solv-propono. Ĉi tiu solvo estas aplikata ankaŭ en pli bonaj gazetvendejaj kajeraj serioj.

Karakterizo de ĉi dua stupo estas ke, ĉu la kontrolo de la testo kaj ekzerco bone rezultis, ĉu ne, la posta instru-propono restas sensanĝe la sama.




3. *Kompensata instruado*





Je la tria ŝtupo ni metu instrusistemojn, kiuj post kontrolo iom adaptiĝas je la kontrol-rezulto, per enŝovo en la instru-procezo de kompensa parto, por la nesukcesintoj.

La malĉeestaj por-instruistaj kursoj, kiujn ni aranĝadas ekde la jaro 1987a en nia universitato, sekvas ĉi tiun modelon.

4. *Individuigata instruado*

Kvare enviciĝas sistemoj kiuj adaptas je la individuaj malfacilaĵoj mem la unue proponatan instruaĵon. Alivorte, surbaze de ia komenca testo, la instru-sistemo 'verkas' apartan lernomaterialon por ĉiu kursano. Por venonta septembro ni aranĝas eksperimenton en tiun direkton.




Temas pri la jeno. Komence de la lernojaro, elektita specimeno da 400 mezgradaj lernejanoj (en Bergama provinco, norda Italujo) estos submetataj je speciala *analogieca testo,* kiu celas antaŭvidi, kie ili renkontos malfacilojn en la irota lernovojo. Baze de la testaj rezultoj, la instrusistemo kompute kunmetos individuajn instrukajerojn por 6-semajna lernoperiodo. La eksperimenta tezo estas ke tia speco de kvazaŭa antaŭ-kompensado malpliigos la inter-individuajn variojn; t.e. ke post tiu traktado la kursanaro estos pli homogena. Strikte parolante, ne temas pri malĉeesta instruado, sed se la eksperimento sukcesos, la individuiga verkosistemo estas ja elportebla el tiu prova medio.

### 3. LINGVAJ PROBLEMOJ EN AŬTOMATA VERKADO

Instrusistemo, malĉeesta aŭ ĉeesta, kiu celas *tajlori* siajn lernomaterialojn al la individuaj ecoj de la instruatoj, nepre bezonas produkti per komputiloj tiujn materialojn. Tio postulas *aŭtomatigi*, kiom eble, fazojn de la instruprepara laboro, kiuj tradicie estis plenumataj farė de homoj. Inter tiuj, troviĝas la verkado de lernokajeroj, de ekzameniloj kaj de juĝoj pri lernorezultoj.

Do ni devas ekspluati la verko-kapablojn de komputaj sistemoj, sed ankaŭ evoluigi tiujn kapablarojn.

Por esti konkretemaj, ni povas distingi 3 ŝtupojn de aŭtomata teksta produktado.

**a)** La unua nivelo estas kompilado de *skemoj*, tabeloj, diagramoj, ktp., ekzemple kun la lernorezultoj.

| | | |
|---|---|---|
| lernanto Ludoviko Lazaro | | |
| kalkulado | → | bone |
| verkado | → | tre bone |
| pentrado | → | sufiĉe |
| ... | | ... |

kaj similaĵoj.




Laŭ tiu solvo la komputilo plej evitas la vere lingvajn tekstojn: pli precize, ĝi uzas lingvaĵojn (vortojn kaj sintagmojn), sed kunmetas ilin ne laŭ lingva gramatiko, sed laŭ tabelecaj aŭ diagramecaj kodoj.

Pli bone tio, ol nenio! Sed memkompreneble, tiu vojo sufiĉas nur por prezenti sistemecajn datumarojn. Ĝi tamen maltaŭgas por argumentadi, komenti, rakonti, ktp.


**b)** Dua-nivela solvo, por igi la komputilon produkti tekstojn estas tia: iuj homoj antaŭpretigas taŭgajn teksto-pecojn, kiujn komputilo kapablas *kunmeti,* laŭ la ricevitaj reguloj, kiuj aplikiĝas al la pri-individuaj datumaroj.

Ekzemple:


Se la lernanto L respondis R1, do diru:



tamen, nur se li eraris pri R1, aldonu:



Alikaze, se la lernanto L respondis R2 kaj R3, sed ne R4, diru:



k.t.p.

Tia vojo povas esti utile irata. Kaj fakte ni sekvas tiajn modelojn en la aŭtomata verkado de la kompensaj kaj baze instruaj materialoj. Tiuj modeloj estas facile programeblaj por komputiloj, sed ili havas siajn limojn.

**1.** Por ke la rezulta teksto estu vere nature homeca, la tekstopecoj devas esti tre zorge elpensitaj kaj verkitaj, tiel ke ili perfekte kunmetiĝu, sen rimarkigi la glu-punktojn. Ili devas esti lingve memstaraj, ne enteni logikajn konektojn, malkongruaj al la ĵusaj aŭ postaj diraĵoj. Tamen tiu memstareco devas ne estigi tedajn ripetojn aŭ stilajn pezaĵojn.

**2.** Tia bloka kunmetado estas nur iugrade fleksebla. La individuiga flekseblec estas malfajna. Malfacile oni povas variigi unuopajn vortojn aŭ vorterojn: la kunmetotaj tekstopecoj devas enteni kompletajn skribajn parolojn.

**c)** Tria ŝtupo de aŭtomata teksto-produktado estas tiu kie la komputilo vere verkas, elektante eĉ la vorterojn, laŭ la ecoj de la alparolato, laŭ la tempaj kaj spacaj cirkonstancoj, laŭ la diversaj mediaj variabloj. Ĝi memkompreneble laboras ne kreive sed ĉiam laŭ fiksitaj algoritmoj.

La menciita verka kapablaro por aŭtomato dependas de du ebenoj da faktoroj. Sur unu ebeno, ni nomu ĝin la 'profunda', kuŝas la *logikaj faktoroj*: por konstrui la frazojn, la aŭtomato devas precize kaj klare 'scii', kion li devas diri. Tio signifas ke la verk-enhava fazo bone algoritme kunligiĝu kun la sciaroj pri la lernosituacio (. . .).Ĉi tio tamen ne estas lingva problemo, sed instruika.

Sur la alia ebeno, la 'supraĵa', kuŝas la lingvaj faktoroj. Tio signifas ke eĉ se la aŭtomato bone 'scias' kion diri, li povus ne kapabli esprimi tion en senerara, flua lingvo. Je ĉi tiu ebeno estas interese kompari la ecojn de la diversaj *lingvotipoj*. Evidente instrusistemo, kiu agas en iu lando, ja ne povas libere elekti sian verko-lingvon: ekzemple ni devas uzi la italan! Tamen ekzistas situacioj, ekzemple de internacia malĉea instruado, kiam eblas elekti inter pluraj lingvaj solvoj.

Ĉi tie, preterkonsiderante la socipolitikajn faktorojn, mi volas evidentigi ke iuj lingvoj povas havi ankaŭ teknikan preferatecon pro siaj strukturaj ecoj.

Do kiaj lingvo-strukturaj ecoj taŭgas por aŭtomata verkado?

Esence tri, laŭ graveca ordo:

1) *sintaksa moduleco* (vorteroj kaj vortoj "facile" kunmeteblaj);
2) *malambigua signifado* (malabundo de plursencaj leksikeroj);
3) *skribmaniero fonem-eca* kaj ne morfologi-dependa.

Ni haltigu la analizadon ĉi tie, en grundo kie ankoraŭ la realigoj estas malmultaj (aŭ neniomaj?), sed kie ja indas esploroj, utilaj por malĉeesta instruado, sed ne nur por tio!

**Bibliografiaj titoloj:**


Vertecchi B. (1988), Insegnare a distanza, Firenze, La Nuova Italia

La Torre M. (1988), "Procedure automatizzate nella didattica a distanza", en Vertecchi (1988)

Vertecchi B. (1991b), "Un doppio *mastery learning* per l'istruzione a distanza", en IAD, 2

La Torre M. (1991b), "Unità didattiche su misura", en revuo IAD, n. 2

Vertecchi B. (1991c), "Una valutazione analogica per individualizzare l'istruzione", en IAD, 3

La Torre M. (1993), "Un esperimento di individualizzazione", en Cadmo, n. 2

Nardi E. (1988), "Questioni di scrittura dei testi", en Vertecchi B. (1988)

La Torre M. (1991a), Ialutare le abilità matematiche nelpassaggio dalla scuola media alla superiore, Firenze, La Nuova Italia

La Torre M. (1991c), "Per una geometria della valutazione", en IAD, I

Frank H.G. (1984), Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva, Tübingen, Günter Narr Verlag

Vertecchi B., Ceccani L., La Torre M., (1992), Ambienti per la tecnologia dell'istruzione, Napoli, Tecnodid

Laeng M. (1984), L'educazione nella civiltà tecnologica, Roma , Armando

Vertecchi B. (1991a) (red.), kunlabore kun La Torre, Marconi, Nardi, Scalera, Thesaurus dell'istruzione a distanza (5-lingva), Napoli, Tecnodid, 1991



**Mauro LA TORRE**

Terza Università di Roma, Dipartimento di Scienze dell'educazione

Via del Castro Pretorio, 20

I-00185 Roma




**INSTRUPRAKTIKO**

# Instrui kaj lernigi


**Johan Hammond Rosbach**


Ĉiu instruisto scias, ke *instrui* kaj *lernigi* ne estas la sama afero. Oni ofte aŭdas junulojn diri, ke tiu aŭ tiu instruisto ne scias lernigi.

La instruado estas la prezento de la lernota materialo. Tion oni povas fari en tre multaj diversaj manieroj, kiel scias ĉiu: oni povas voĉlegi, skribi sur la nigra tabulo (kiu ordinare ne plu estas nigra), prezenti solvotajn problemojn, ktp. — ne necesas mencii ĉiujn.

La personeco de la instruisto estas grava faktoro. Ni memoras el niaj tagoj kiel lernantoj, ke tiu instruisto estas seka, tiu alia sukcesis krei intereson pri la materialo. Sed ni ankoraŭ memoras, ke eĉ la popularaj kaj lernigpovaj instruistoj kelkfoje kvazaŭ perdis la fajreron — kaj ni pardonis, ĉar li aŭ ŝi eble havis personajn aŭ familiajn problemojn, eble havis malbonan nokton aŭ tro bonan vesperon en la antaŭa tago.

Estas inspira tasko instrui inteligentajn kaj lernemajn gejunulojn, vidi la eklumon, la rapidan fulmon, en multaj okuloj, kiam la malfacila punkto subite klariĝis kaj fariĝis memkomprenebla. Oni sentas, post tia travivaĵo, ke la tasko de la instruisto estas la feliĉo mem.

Sed — la „tempoj" ŝanĝiĝas. En Norvegujo oni enkondukis la laŭleĝan rajton de ĉiu junulo por trijara instruado post la naŭ jaroj da elementa lernejo. Tio kompreneble rezultas klasojn kun granda parto de lernantoj ne tre entuziasmaj pri libroj kaj studoj.

Se la tasko estas inspira en la klaso de „geniuloj", ĝi fariĝas multe malpli inspira, se tre granda procentaĵo de la klaso estas gejunuloj, kiuj kvazaŭ kontraŭstaras ĉiun lernadon.

Sed la devo de la instruisto restas: li estas respondeca pri la lernado, li devas zorgi, ke oni bonorde trastudu la jarprogramon, li devas laŭ la eblecoj akiri por siaj lernantoj la plej bonan ekzamenon.

Kion fari, se la grupo sin prezentas tagon post tago en la klaso sen eĉ minimumo da hejma preparado, se ili senhonte konfesas, ke ili eĉ ne malfermis la libron por lerni la dek germanajn vortojn, kiuj estis la sola lernota ero por la tago!

Brutala metodo estis, siatempe punlaboro. Tio e b l e povis doni rezulton. Sed samtempe oni devas scii, ke la lernota lingvo ne grave plipopulariĝas, se ĝi havos ankaŭ la amaran guston de io malagrabla!

Mia eksperimento certe ne estas unika, sed mi supozas, ke ĝi povas esti interesa ĝenerale, kaj por kelkaj kolegoj eble eĉ utila.

Temas pri tuta klaso, kiu estis vere kontraŭstara al ĉiu lernado de germanaj vortoj. Tagon post tago mi ripetis, diversmaniere, eĉ per ludoj, kiujn ĉiuj manfrape akceptis, sed la rezulto estis mizera.

Tiam mi pensis, ke la luda elemento estas grava ero, sed mi trovis, ke ĝi ja ne estis sufiĉe grava. Do, aldone al la luda aspekto, mi devis trovi ankaŭ alian econ, kiu estos profitdona. Ĉu ni provu la konkursan aspekton? Ion, kio donas premion, kaj kiu samtempe reprezentos malplaĉon, se ĝi ne estas sufiĉe bone farita? La tento estis granda. Mi devis samtempe trovi ion, kio ne estas temporaba, ion, kio ne donos al mi multe da laboro, kaj kio ne forprenos de la instruado valorajn minutojn.

Jen la solvo:

Mi elektas dek vortojn, kiuj devis esti lernitaj en la pasinta semajno. Ĉiu lernanto ricevas papereton, tiel malgrandan, ke ĝi havas lokon nur por la dek vortoj. Mi diras la vorton norveglingve, kaj la lernantoj devas tuj skribi la korespondan germanan vorton. Kiam ĉiuj dek vortoj estas prezentitaj, mi kontrole voĉlegas ilin ankoraŭ unu fojon, kion la lernantoj rigardas kiel bonvoleman kromservon.

Tiam mi kolektas la respondojn. Sed — atentu bone! — ne ĉiujn! La kvin junuloj, kiuj sidas tute maldekstre, kaj la kvin kiuj sidas tute dekstre, devas doni al mi siajn paperojn. Mi kompreneble tiam informas, ke ĉiu, kiu ankoraŭ deziras doni sian paperon al mi, rajtas tion fari. Povas ja esti, ke iu aŭ alia scias, ke li faris bone, kaj mi ne volas forpreni de tiuj la ŝancon pri bona noto.

Jam la postan tagon mi redisdonas la paperojn, kaj poste sekvas simila ekzameneto. En tiun mi enmetas du aŭ tri vortojn, kiuj aperis en la unua tasko.

Nun oni kompreneble atendas, ke mi postulos la paperojn de tiuj, kiuj hieraŭ ne estis kontrolitaj. Sed tion mi ne faras. Mi kolektas ekz. la respondojn de ĉiuj, kies nomo komenciĝas per la dek unuaj literoj de la alfabeto. Samtempe mi postulas la paperojn de tiuj, kiuj en la unua tago ricevis la du plej malaltajn notojn.

Mi povas aserti, ke la lernantoj treege rapide trovas, ke ili inteligente travidis mian ruzon — kio ja estis mia intenco! Kaj por venki, por kvazaŭ trompi la instruiston, kelkaj jam komencas lerni dek vortojn por la tria tasko, kiun mi kompreneble anoncis. Montriĝas, ke la nombro de tiuj nedevigitaj doni al mi la paperon, kiuj tamen donas ĝin, rapide kreskas. Oni eltrovis la ruzon! Oni eltrovis, kiel facile ekhavi bonan noton, kvazaŭ ĉirkaŭirante la problemon prezentitan de la instruisto.

Mi ne scias, ĉu tio ĉiam estas sukcesa procedo. Ĝi tamen montriĝis tre sukcesa por mi dum dek jaroj. Kaj mi poste renkontis homojn, kiuj haltigis min surstrate, gratulante pro la „paperetoj" kaj dankante pro la lernigo, ne pro la instruado.

**Johan H. ROSBACH,**
Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg, Norvegio.



**PRAKTIKAJ PRAKTIKOJ**

La elpensinto de la subaj instru-faciligaj teknikoj ĉeestis prezenton de rektmetoda kurso dum pedagogia aranĝo, kie oni povis envie konstati la vastan uzeblon de felta tabulo, sur kiu oni povis facile fiksi kaj malfiksi „memtenajn" bildetojn, figurojn. Ĉar la bezonataj materialoj ne estas facile akireblaj en ĉiu mondparto, Mike Sadler iom eksperimentis kaj elpensis eĉ tri anstataŭojn:

## Pinglotuko, akvotabulo kaj elektrotabulo

Al tiuj kiuj ŝatus same fiksi bildojn al pendanta tuko (ĉi-rimede ne nepre haroza kiel felto) kaj povi ankaŭ „etikedi" infanojn, mi proponas simple glubendi pinglon al la dorsflanko de ĉiu bildo. Tio apenaŭ estas danĝere, ĉar la pinglo ne estas en „pikiva" pozicio.

Al tiuj kiuj volas meti bildojn sur nigran tabulon (aŭ alian relative glatan surfacon — ju pli glata despli bone) por povi apudskribi, alkreti fonon ktp., mi proponas meti pecon de larĝa ordinara, travidebla glubendo (aŭ glui similan plastaĵon) sur la supran parton de la dorsflankoj. Viŝinte vian tabulon kaj eventuale ankaŭ la dorsflankon per enakvigita spongo, vi simple metas la plastkovritan parton sur la malsekan lokon kaj... ĝi restos tie! (se vi tutkovras per plasto, estas pli malfacile demeti la bildon.)

La „elektra" metodo profitas tiun fenomenon laŭ kiu kraketadas via nilona ĉemizo kiam vi malvestas vin. Diversaj plastaj folioj „elektras" sed pleje mi trovis ĉe tiuj simplaj A4 duoblafoliaj travideblaj dosierujoj. Se vi kunmetas kelkajn flank-al-flanke, vi havos tabulon kiu altiros paperojn, bildojn, ktp. post kelksekunda frotado per tuko.

Improvize via
Mike **SADLER**
Gyál, Bajcsy Zs. u. 93.
HU-2360

## Vort-loto

La instruisto antaŭpreparas du stokojn da kartetoj. Sur la kartetoj de unu stoko oni surskribas novajn vortojn Esperante; de alia — nacilingve. Unu el la stokoj oni disdonas al la lernantoj poegale. La ludgvidanto prenas po unu karteton el la restinta stoko kaj legas la vorton skribitan sur ĝi. Ĉiuj serĉas la respondan karteton. La posedanto de tiu legas la vorton alilingve kaj preninte la karteton kovras per ĝi la sian. Gajnas tiu kiu plej rapide kovras ĉiujn siajn kartetojn. Li estiĝas ludgvidanto por nova ludo, kiam ĉio komenciĝos denove.

Aleksandro **INGORJ**
UKR-244030 Sumi-30
a/k 1604, Ukrainio

# Testo fine de porkomencanta kurso

Jen kelkaj demandoj kaj taskoj, kiujn oni povas doni al la partoprenantoj de kurso por komencantoj, prefere je la fino. La 30 eroj povus servi kiel malgranda testo, simpla laborfolio, por ripetado aŭ kiel amuzaĵo por la gelernantoj. La testo estas tre subjektiva kaj konsistas el varioplena aro de la plej diversaj sciaĵoj kaj kapabloj. Kompreneble la scio aŭ nescio de la respondoj ne aŭtomate diras, ĉu iu sukcese sekvis la kurson. Ankaŭ demandeblas, ĉu unuopaj demandoj (ekz. 21 aŭ 26) jam ne apartenas al kurso por progresintoj.

Manplenon da punktoj (1, 5, 10, 24, 25) mi enmetis, ĉar laŭ mia sperto ankaŭ komencantoj devas kelkfoje "defendi" nian karan lingvon; do eĉ en la unua kurso oni donu al ili bonajn argumentojn por respondi certajn oftajn demandojn de eksteruloj. Mi rekomendas, ke vi traduku ĉion en la gepatran lingvon de viaj gelernantoj; la ekzemplojn mi donis en la germana (ekz. 12 kaj 18) – tie vi devus preni vortojn el via lingvo. Do, karaj gekolegoj, simple elprovu la teston kaj bonvolu peri al mi viajn reagojn kaj impresojn.

Harald SCHMITZ
Christophstr. 10, DE-50259 Pulheim, Germanio

## Kelkaj demandoj kaj taskoj rilate al Esperanto

1.) Kiel nomiĝas la iniciatoro de Esperanto ?
2.) Nombru en Esperanto de 87 ĝis 119.
3.) Kion efektivigas la finaĵo -j ?
4.) Prezentu vin mallonge per kvin frazoj en Esperanto.
5.) Listigu tri punktojn, kial Esperanto estas relative facile lernebla.
6.) Donu po du vortojn, kiuj venas el la ... (ekz. angla aŭ la germana).
7.) Kiuj estas la signifoj de la afiksoj -il, mal-, -in, -ej, vir-, kaj -id ?
8.) Traduku la tabelvortojn: kiam, tial, ĉio, tiel, kien, nenies, kia, neniu.
9.) Kiel oni povas distingi en la internacia lingvosubstantivojn, adjektivojn kaj (derivatajn) adverbojn ?
10.) Kial Esperanto estas neŭtrala aŭ eĉ "justa" lingvo ?
11.) Kiam kaj kie Esperanto estiĝis ?
12.) Kio okazas kun la internacie konataj vortoj, ekz. 'Mathematik', 'Psychologe', 'Symbol' ?
13.) Traduku la helpverbojn: 'müssen', 'können', 'dürfen', 'sein' (esperante: devi, povi, rajti, esti).
14.) Tri landnomoj: Aŭstrio, Usono, Francio. Kiel en (la germana) ?
15.) Vi konatiĝas kun iu. Starigu (almenaŭ) kvar Esperantajn demandojn.
16.) Kion diras al vi la verbaj finaĵoj -is, -as, -os, -us kaj -u?
17.) Listigu ok bestonomojn en Esperanto.
18.) Kiuj estas la personaj pronomoj en Esperanto?
19.) Analizu la vorton *malsanulejoj*. (sana = gesund)
20.) Formu dek novajn E-vortojn el la literoj de *Internacia Seminario*.



21.) Kial oni ne povas diri pri vampiro: "Li vidas sin en la spegulo"? Kaj kial eblas: "Li vidas lin en la spegulo"?
22.) Listigu kvin adjektivojn, per kiuj oni povas priskribi personon.
23.) Kelkaj gravaj verboj: aŭdi, vidi, manĝi, loĝi, vivi, trinki, dormi, lerni, tuŝi. Kiel oni esprimas ilin en la angla (aŭ alia lernata lingvo)?
24.) Ĝuste aŭ ne ĝuste: "Esperantaj poemoj estas enuigaj, oni ja nur havas la finaĵojn kaj rimojn je -a, -e aŭ -o."
25.) Klarigu la vortludojn, kiujn oni povus malkovri en: kolego, kataro, papero, amperforto.
26.) Kiel funkcias la tabelvortoj?
27.) Prononcu kaj kalkulu: 12x12; 252:3; 0,75– 0,4; 1,01 +0,9.
28.) Nomu sep lernejajn fakojn en Esperanto?
29.) Trovu kvin vortojn, komenciĝantajn per *t* kaj finiĝantajn per *o*.
30.) Per kiuj esprimoj esperantistoj ofte salutas kaj adiaŭas unu la alian?

Necesos decidi, kiujn demandojn oni respondu Esperante, kiujn nacilingve, kaj sekve, ĉu iujn demandojn oni povus prezenti en Esperanto - red.

**********

## INTERNACIA KONKURSO PRI MODELA ESPERANTO-PAROLO
### honore al Ivo Lapenna

Por etendi al Esperanto tradicion de pluraj landoj, ni organizas internacian konkurson (ĉi-jare por bazlernejanoj, t.e. por 10 ĝis 14 jaraj geknaboj. De jaro al jaro alternas la konkurso laŭ celgrupo: *infanoj, junuloj, plenaĝuloj*). La konkurso volas turni atenton al bela, modela, klara kaj komprenebla parolo en Esperanto. La plej bonaj estos distingitaj per honoraj diplomoj de **Ivo Lapenna**.

Ĉiu aliĝinto prezentos libere elektitan prozan tekston ne pli longan ol 20 tajpitaj linioj. La instruisto mem ĵurios siajn lernantojn kaj sendos la plej talentajn (ne pli ol 2 personojn) al landa konkurso, kie la konkursantoj denove prezentos siajn tekstojn kaj poste nekonatan tekston ricevitan samloke. La voĉoj estos registritaj kaj la registraĵoj estos ĵuriitaj de tri kompetentaj personoj, apartenantaj al tri diversaj etnaj lingvoj. Ĉiu el ili poentos ĉiun registraĵon ne konante la pritaksajn notojn (de 1 ĝis 10) de la ceteraj ĵurianoj.

Ĉe prijuĝado estos konsiderataj:

1) Klara kaj regula prononco de ĉiuj sonoj, silaboj
2) ĝustaj akcentado kaj intonado
3) ritmo kaj laŭsenca disigo de penselementoj.

**Aliĝo ĉe propra instruisto** ĝis la 31a de januaro 1994.
**Loka konkurso:** en la dua semajno de februaro 1994.
**Landaj konkursoj**: fine de marto 1994. Ĵuriado dum aprilo 1994.
**Prezento de distingitoj** ĝis la 15a de majo 1994.

Ĉiuj instruistoj kies lernantoj deziras partopreni en la konkurso informu la organizanton: s-ro Géza Kurucz, ĝis la 5a de februaro 1994. **Adreso:** Gimnazio Julia Bányai, Géza Kurucz; Nyíri út 11, HU-6000 Kecskemét; Hungario.

## Pasinto, nuno kaj estonto en la infana kreado

## Internacia konkurso de infanaj desegnaĵoj

La konkurson organizas krea unuiĝo GNOSIS je la nomo de N.K. Reiĥ kaj Elektrostala ekspoziciejo kune kun ties Esperanto-klubo *ELANO*.

Unu el la celoj de la konkurso estas pensigo de infanoj kaj iliaj pedagogoj pri la problemoj de nuno kaj estonto de la homaro el vidpunkto de iliaj pozitivaj solvoj. Ĝuste tian vivrigardon strebis veki pere de sia kreado granda pentristo-humanisto de la 20-a jarcento, Nikolaj Konstantinoviĉ Reriĥ (1874–1947). La ideo pri ekkonscio de nedividebleco de pasinto, nuno kaj estonto dum la historia evoluo de la homaro fundamentis la internacian kontrakton, proponitan de Reriĥ al la tutmonda komunumo. Tiu dokumento estis akceptita en 1935 kaj enhistoriiĝis sub nomo *Pakto de kulturo* aŭ *Pakto de Reriĥ*. Nuntempe ĝi eniras la konsiston de Internaciaj Hagaj Konvencioj.

En kondiĉoj de komplikaj sociaj kaj ekologiaj procezoj sur nia planedo, precipe dum lastaj jaroj, al infanoj necesas doni spiritajn kaj moralajn orientilojn por konstruado de la estonta socio. Unu el tiaj orientiloj estas la ideo, ke por kreado de pli bona estonto necesas scii pri la pasinto kaj aktivi en la nuno.

Starigo de ĉi tiu problemo antaŭ infanoj dum ilia pentrokreado stimulos ilian intereson al historio de familio, urbo, lando kaj tutmonda civilizo, kontribuos por veki ilian senton de respondeco pri siaj pensoj kaj faroj antaŭ la venonta homaro. La konkurso, laŭ opinio de ĝiaj organizantoj, devos kontribui al harmoniigo de homaj interrilatoj kaj plifirmigo de paco sur la tuta planedo.

Materialoj de la konkurso prezentos ankaŭ sciencan intereson por la fakuloj. Krome, la paratopreno en la konkurso ebligos por infanoj korespondadon kun samaĝuloj el diversaj partoj de la mondo.

### LA KONKURSA REGULARO

Partopreni la konkurson rajtas ĉiuj infanoj kaj adoleskuloj ĝis 17 jaroj, loĝantaj ie ajn en la mondo. Ĉiu partoprenanto prezentas unu, du aŭ tri verkojn laŭ la temoj de konkurstitolo: pasinto, nuno, estonto. Temas pri historio de homo, familio, urbo, popolo, lando, planedo ktp.

Konkursaj grupoj: ĝis 7-jaruloj, 8–12-jaruloj kaj 13–17-jaruloj.

Rezultoj de la konkurso estas anoncotaj inter la verkoj laŭ ĉiu temo aparte en ĉiu konkursa grupo. La ĵurio nomos premiitojn, laŭreatojn kaj venkintojn de la konkurso, kiuj estos honoritaj per diplomoj kaj premioj.

Ĉiu partoprenanto, deziranta korespondi kun siaj samaĝuloj, ricevos iliajn adresojn.

La plej interesaj verkoj formos migrajn ekspoziciojn en urboj kaj landoj de la konkursantoj.

La verkoj povas esti plenumitaj per ajna teknikrimedo sur papero aŭ kartono laŭ la maksimuma dimensio 50 x 60 cm kaj laŭ la minimuma 30 x 30. Sur ĉiu verko en la dekstra malsupra angulo necesas preslitere surskribi familian nomon, nomon kaj aĝon de la aŭtoro kaj dorsflanke titolon de la verko, familian nomon, nomon, aĝon kaj adreson de la aŭtoro. Kunsendu akompanan formularon kun la supraj indikoj kaj eventualaj kromaj informoj (ŝatokupo, kial vi elektis la temon, ĉu vi volas korespondi kun viaj samaĝuloj ktp.)

La verkoj devas esti forsenditaj ne pli malfrue ol la 31-a de januaro 1994.

La anonco de la rezultoj okazos en majo 1994.

La verkojn sendu al: Elektrostal Moskva regiono, Ĉerniŝevskogo, 38. Ekspozicia halo RUS–144003

Esperanto-korespondaĵojn pri la konkurso sendu al la prezidanto de Eletrostala Esperanto-Klubo *ELANO*, Vjaĉeslav BRAGIN, Elektrostal Moskva regiono, Pervomajskaja 14–45. RUS–144006

Telefonaj Esperanto-kontaktoj: (-09657)-45431, Klara Ilutoviĉ



## Vytest kaj Vytest-S

## Komputoraj porlernejaj programoj

ATOS en Žilina, Slovakio estas juna firmao de grupo de aktivaj programistoj de komputoraj programoj. La direktoro estas inĝ. Vladimir NEMEC, jam esperantisto dum multaj jaroj.

**Formulo:** *traduku vian programon esperantlingven, difinu en kiu lando vi volas prezenti ĝin nacilingva, serĉu kunulon esperantistan, kiu pretas kaj kapablas fari la tradukon kaj produktu...*

Ekde kelka tempo ATOS specialiĝas en porlernejaj programoj, precipe sur la matematika tereno. En tiuj programoj ATOS enigis siajn ideojn pri plibonigo de la direktaj kontaktoj inter la instruisto kaj siaj lernantoj. Tiel ekestis la programo VYTEST por uzo en retaj sistemoj kiaj Lantastic, Novell ktp. kiuj nuntempe pli kaj pli uziĝas en la lernejoj.

Kunlaboro inter ATOS kaj samideano inĝ. Tammo Kanter en Nederlando rezultigis nederlandlingvajn versiojn de ambaŭ programoj, dum ke ankaŭ anglaj versioj baldaŭ estos akireblaj. Tiamaniere en relative mallonga tempo produktiĝis la programoj en la slovaka, ĉeĥa, nederlanda kaj angla lingvoj, krom en Esperanto.

**Pluraj eblecoj**

Kvankam la programoj origine estas disvolvitaj por uzo dum matematikaj lecionoj, precipe geometriaj, montriĝis jam baldaŭ ke la sistemo ankaŭ por aliaj lernejaj fakoj estas tre alloga: fiziko, mekaniko, elektrotekniko... ATOS krome okupiĝas ankaŭ pri ne-ekzaktaj temoj, kiel la studado de nacia lingvo, kiu en diversaj landoj en la mondo ŝajnas prezenti problemon al la hodiaŭa junularo.

**Kial nomi la programojn unikaj?**

Kvankam ekzistas pluraj programoj pri matematiko, kiuj uziĝas en lernejoj, la programoj VYTEST kaj VYTEST-S havas la avantaĝon, ke instruisto povas facile enigi siajn proprajn taskojn kaj ke studento povas uzi sufloron. La lasta estas alvokita helpo, kiam la studento ne scias kiel komenci aŭ kiamaniere fini la taskan problemon. Tiu helpo estas farita de la instruisto mem ĉe la kreo de la tasko: kiam li enŝaltas la sufloron siaflanke, ĉio, kion li kreas kiel solvo, ankaŭ poste de la studento povas esti pristudata. Fakte estas tiel ke la studento tiam povas sekvi la instruiston ĉe ĉiu paŝo, ĝis kiam la solvo de la geometria problemo estas finita. VYTEST en reta konfiguracio krome havas la avantaĝon ke la instruisto sur sia ekrano, dum la leciono, samtempe povas vidi ĉu la studentoj kapablas solvi la taskojn.

Bone komprenu, ke ne estas necese, ke ĉiu studento solvu la saman problemon samtempe. Ĉiu povas elekti el nombro de ofertitaj taskoj. La instruisto havas la eblecon fari sugeston al la studento, kiu ne iras en la bona direkto. Temas pri la konstrukcioj de geometriaj figuroj, sed ankaŭ tekstaj taskoj al kiuj estas ligitaj demandoj, povas esti enigataj. En la lasta kazo la instruisto

unue formulas la taskon, tiam enŝaltas la sufloron kaj sekve enskribas regulon post regulo de la solvo. Tia ekzemplo estas trovebla sur la demo-disko.
**Petu la senpagan Esperantlingvan Demo-version por ekhavi al vi ideon de la eblecoj! Postuloj: DOS-komputoro kun VGA-karto.**
ATOS, Zvolenská 5; SK-010 08 Zilina, Slovakio. Tel.: +42 89 54135

## Kial malaperas multaj varbitoj?

Lastatempe ne unufoje mi legis en Eventoj pri preskaŭ senefika lerneja Esperanto-instruado, nome pri tio, ke ĉiujare miloj komencas lerni la Internacian Lingvon, tamen la membraro daŭre stagnas. Kvankam la kritiko ne eldiris verdikton, tamen ĉiu povas subsenti malkontenton pri la laboro de la instruistoj.

Mi longe meditis pri la problemo kaj estis momentoj kiam mi preskaŭ akceptis la argumentojn de la kritikintoj. Fakto estas ja fakto. Refuti ilin ne estus facile. Poste mi komencis kompari nin kun la ceteraj instruistoj de fremdaj lingvoj. Ĉu ili donas pli da scio, ĉu ili pli bone preparas la geknabojn, ĉu ili pli sindone dediĉas sin al la instruata lingvo?

Al ĉiuj supraj demandoj oni povas respondi per kategoria NE. La diferencoj estas konstateblaj jene:

1. Ni, esperantistoj-instruistoj konsideras helpo aŭ subteno, se la direktoro aŭ la kolegoj rilatas al ni neŭtrale, se ili toleras nian ĉeeston.

2. Niaj eblecoj estas multe pli modestaj ol tiuj de la ceteraj.

3. La instruisto de Esperanto laboras pli ol siaj kolegoj, senpage prenas sur sin taskojn, kiajn la ceteraj nur malofte entreprenas.

El kio do rezultas la diferenco ŝajne negativa kompare kun la aliaj lingvoj? Mi emfazas ke la negativa rezulto estas sole ŝajna. Niaj lernantoj montriĝas same bonaj aŭ malbonaj kiel ĉe aliaj fremdaj lingvoj, eĉ mi trovas iom da pluso antaŭ alilingvuloj.

La bazan diferencon mi trovas en *la praktika uzebleco* de Esperanto. Rigardu nur kiel vastaj eblecoj malfermiĝas antaŭ lernanto pli malpli posedanta fremdan etnan lingvon. Oni bombardas lin per allogaj libroj, revuoj, kanzonoj, vidbendoj, konkursoj, ekskursoj, tendaroj, prezentas al li aron da okupoj, profesioj, el kiuj li povas eltiri konsiderindan profiton.

Nia oferto estas malriĉa kaj senbrua. Ni konas la kialojn.

Kio sekvas el ĉio ĉi por nia lerneja E-instruado?

a) Estas necese turni pli da atento al spirita preparo de la lernantoj. Ni devas hardi ilian konvinkon pri demokratia destino de la Internacia Lingvo.

b) Necesas fari ĉion por riĉigi nian oferton. Al tio sendube la unua paŝo estas fruktuzi la ekzistantajn eblecojn: konkursojn, revuojn, renkontojn ktp.

Ni ne tro vipu tiujn, kiuj laboras super siaj fortoj, ĉar tio rezultigos nur antaŭ-tempan foriron el la movado. Ni estu paciencaj, toleremaj kaj persistaj.

Por tio mi deziras multajn sukcesojn.

Géza Kurucz Nyiri u. 11. HU-6000 Kecskemét



# Novaĵoj de la 78-a UK kaj 27-a ILEI-Konferenco
## Valencio, 24.07.–06.08.1993.

- La ĉeftemo de la UK estis: **„Klerigo por la 21 jarcento"**
  Dum la solena inaŭguro enkonduka prelego farita de
  d-ro Duncan CHARTERS
- ILEI-kunsido dimanĉe: partoprenis 36 personoj el 20 landoj
- Propono pri rezolucio al la Komitato de UEA
  en la financan planon eniris nova rubriko, iom pli da espero por ILEI
- Tago de la Lernejo
- Internacia Ekzameno kun deko da partoprenantoj

- **Konferenco de ILEI**: 48 partoprenantoj
- komitatdecidoj:
  estrara, financa kaj kontrolkomitata raportoj akceptitaj
  ILEI povos iĝi posedanto de unu akcio de E-centro en Poprad
- La Komitato elektis:
  novan prezidanton de ILEI: d-ro Duncan CHARTERS
  reelektis sekretarion: Marija BELOŜEVIC
  novan komisiiton pri la eldonado: Stefan MacGILL
  novan honoran membron: Doroteo HOLLAND-KAUPP
- la Komitato ankaŭ
  plialtigis sian internacian jarkotizon al 20 gld (validas ekde la jaro 1994)
  voĉdonis por la LS de la jaro 1992: Ĉinio kaj Usono
  akceptis novajn landajn sekciojn: Albanio kaj Kubo
- dum la Konferenco oni ankaŭ prezentis
  novajn eldonaĵojn de ILEI:
  *„Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado"* de Mag. I. Szanser
  *„Tendaraj Tagoj"* de S. MacGill (reeldonita 1-a volumo)
  kaj de ILEI-ano K. Smidéliusz: *„Ĉu vi aŭdis ke..."*
  video-bendon pri Koreio kaj venontjara ILEI-konferenco
- oni aŭdis antaŭanoncon por la ILEI-konferenco en la jaro 1995.
- **2-an Gimnazion** partoprenis 10 gelernantoj el 8 landoj
- Modelajn lecionojn g vidis M. Bacev, E. Bojaĝieva, S. MacGill.
  D. Charters, M. Makay kaj C. Hooley – mem gimnaziano.
- ILEI iomete pliriĉigis konton *Szerdahelyi* dank'al la loterio.



Se vi deziras ekscii iom pli pri la supraj okazintaĵoj, petu la protokolon aŭ de via sekciestro, aŭ de la sekretario de ILEI aŭ de la redakcio de IPR!

## EKKONU VIAN NOVAN PREZIDANTON

Ni tion faru per konciza biografio preparita por la Internacia Kongresa Universitato en Valencio: 'Duncan Charters, brito disvolvanta sian profesian karieron en Usono, magistriĝis pri la studo de fremdaj lingvoj ĉe la Universitato de Kembriĝo, Anglio, kaj faris post-diplomajn studojn ĝis doktoriĝo en la Universitato de Indiana, Usono. Tiuj studoj inkluzivis hispanan lingvon, kulturon, historion kaj literaturon, kiel ankaŭ instrumetodojn pri fremdaj lingvoj. En 1979 li doktoriĝis per disertacio 'Honoro kaj honto en la hispana pikareska literaturo, 1554-1646.' De 1974 li instruas en la ŝtato Ilinojso ĉe Principia College, kie li respondecas pri la programo de hispana lingvo, kulturo kaj literat uro, kaj kunlabore kun la fakultato pri edukado preparas studentojn por diplomiĝo kiel ŝtataprobitaj lingvoinstruistoj.'

Tiu elektiĝo signifas, ke la plimulto de la estraro de ILEI nun vivas eksteroŭrope. Ni esperas en la venonta numero prezenti artikolojn de la nova kaj antaŭa prezidantoj skizante la atingojn, obstaklojn kaj perspektivojn por la Ligo. Por scii pli pri la Esperanta laboro de d-ro Charters, vidu IPR 4/92, p.17 kaj la nunan numeron, p. 20-23.

## APARTA RUBRIKO 'EVOLUIGO' ĈE UEA

Fundamenta debato okazas nuntempe en la Estraro de UEA, kiomgrade dediĉi limigitajn rimedojn al livero de servoj al membroj de la Asocio, kiom al disvastigo: informado, instruado, eksteraj rilatoj kaj aplikado. Tiun duan gamon da agadoj UEA tradicie financas ĉefe el fondaĵoj, aŭ el eventuale restantaj sumoj en niĉoj de la jaraj buĝetoj. Sekve, tre malfacilis entrepreni nerutinajn konkretajn disvastigajn projektojn, kiuj ja bezonas fideblan rimedan bazon jam komence. Fondaĵ-bonfarto dependas forte je donacoj, heredaĵoj kaj UK-profitoj, kiuj povas iujare abundi, alijare magri.

ILEI mem akre suferis je tio ofertinte stipendiojn por instruistaj kursoj en 1993 – la kontribuo de UEA restis malcerta ĝis la lasta momento, kiel ankaŭ la atendeblaj kostoj (kiuj ja multis).

Tial ILEI volonte alianciĝis kun proprono de la inform-agantoj en UEA al la Komitato de UEA en Valencio. Tio akceptiĝis kun rezulto, ke la buĝeto 1994 (kaj supozeble estontaj) enhavas unuafoje specifan rubrikon 'Evoluigo' kun tri subfakoj: Informado, Instruado kaj Eksteraj Rilatoj. Sub Instruado aperas 4000 NLG (kompare 3000 NLG antaŭe kaj 2000 NLG en 1993).

La plimulto de la sumoj en tiu nova rubriko estas fakte transmetitaj el disaj eroj de la antaŭa buĝeto kaj ne konsistigas novajn elspezojn, sed alia parto ja estas nova. Tio ne ĝojigas tiujn en UEA, kies unuavica tasko estas rekaj pli-sanigi la asociajn financojn.

ILEI, komprenante la neceson prudente mastrumi la kontojn, tamen laŭdas la paŝon agnoski per nova buĝeta rubriko la devon kaj defion evoluigi



Esperanton. Per tio ĝi donas dependeblan kaj antaŭkoneblan rimed-bazon al tiuj volontuloj, kiuj livervole laboradas disvastigi, instrui kaj instruigi la lingvon.

*smg.*

## KONTRAKTO KUN EVENTOJ

Kiel jam raportite, la Estraro en marto 1993 subskribis tion. Ĝi leviĝis al diskuto en la Konferenco pro la kutimo de la gazeto aperigi la vorton 'Esperanto' per minuskla 'e'. La redakcio rikoltas nun opiniojn pri tiu demando. Ĉiuokaze, la konferenco lasis la kontrakton validi, aŭdinte pri la fortaj administraj, helpaj kaj diskonigaj rilatoj inter ILEI kaj *Eventoj*. Sed fakte la teksto de tiu kontrakto neniam aperis en IPR, do ni nun riparas tiun mankon.

# Kontrakto pri kunlaboro

kio ekestas inter *ILEI* (1034 Budapest Eső u. 7.) kaj la Redakcio de *EVENTOJ* (1675 Budapest pk. 87.).

***1. Ambaŭ partneroj konsentas, ke:***

1.1 Lingvokurso, kie oni instruas nur la lingvon kaj ne donas la necesajn movadajn konojn, preskaŭ certe rezultas la malaktiviĝon de la kursano, kion ĝenerale sekvas la neuzo kaj poste la forgeso de la lingvo.

1.2 Estas ege grave, ke gvidanto de iu ajn E-kurso estu detale informita pri la servoj, ebloj kaj funkciado de la internacia esperanto-movado.

1.3 La movada klereco de la E-kursgvidantoj, la informfluo inter la membroj de *ILEI* estas unu el la plej gravaj strategiaj nodoj de la E-movado.

***2. Por helpi la agadon de E-kursgvidantoj, ILEI kaj EVENTOJ decidas strikte kunlabori:***

2.1 *ILEI* per ĉiuj siaj rimedoj instigas siajn membrojn, la e-kursgvidantojn, la e-instruistojn aboni al la gazeto *EVENTOJ*, kiu servos ankaŭ kiel rapida informilo inter la *ILEI*-membroj en la intervalo de du *IPR*-numeroj.

2.2 *ILEI* per siaj rimedoj (konferencoj, seminarioj, IPR, ktp.) instigas siajn membrojn, ke en ĉiu kurso oni "instruu" ankaŭ la movadajn konojn.

2.3 *ILEI* alvokas ĉiujn kursgvidantojn, ke por ligi la lernantojn al la movado, ili abonigu la kursanojn al iu regula E-revuo, gazeto ankoraŭ dum la kurso.

2.4 *EVENTOJ* vaste informas pri la agado de *ILEI*, per diversaj materialoj prezentas ĝian funkciadon. La artikoloj estos skribitaj de *ILEI*-komisiitoj, kiuj konsideras la kutiman longon, stilon, karakteron de la jamaj artikoloj kaj rubrikoj.

2.5 *EVENTOJ* aperigos artikolojn, kiuj informas la legantojn pri la servoj, ebloj kaj funkciado de la internacia esperanto-movado.

2.6 *EVENTOJ* per siaj artikoloj klopodas informi kaj helpi la ekstermovadan uzon de la lingvo.

2.7 *EVENTOJ* certigas la eblecon por *ILEI* aperigi operativajn, rapidajn informojn al siaj membroj.

Budapest, la 26-an de marto 1993.

Stefan MacGill

Szilvási László

# RAPORTO PRI LA KONGRESA TEMO "KLERIGO POR LA 21-a JARCENTO"

## de la 78a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en VALENCIO

Dum la tuta kongresa semajno montriĝis daŭre vigla intereso pri la kongresa temo, „Klerigo por la 21-a jarcento". Vendredon matene cento da partoprenantoj plenigis la salonon Waringhien por aŭskulti raportojn de diversaj studgrupoj pri aspektoj de la temo kaj la resuman raporton de la reĝisoro de la temo.

Sekvas nun en tre koncizigita formo kelkaj el la konstatoj kaj rekomendoj de la laborgrupoj, kun kelkaj ĝeneralaj konkludoj. Jam de la unua tago, kiam la partoprenantoj indikis per kartoj demandojn, proponojn pri diskutindaj subtemoj, kaj eventualajn kontribuojn kiujn ili povus fari, montriĝis la seriozeco kaj klereco de la interesitoj. Kadre de la Internacia Kongresa Universitato ni aŭdis tri pritemajn prelegojn de konataj universitataj fakuloj: respektive doktorino Urueña pri „Klerigo por la 21-a jarcento en la internaciaj rilatoj" (fake adjunkta profesoro pri internacia publika juro en la hispana universitato de Valladolid); doktoro Maŭro La Torre pri netradicia eksterklaseja instruado pere de „Personigitaj malĉeaj instrusistemoj" (fake laboranta en la Tria Universitato de Romo pri lernotaksado kaj malĉea instruado); kaj doktoro Humphrey Tonkin pri la ŝanĝoj en tradicia instruado kaj lernado kiujn devigos „Nova jarmilo, novaj universitatoj".

Aliajn subtemojn mallonge enkondukis de la podio diversaj fakuloj, sed plej longan tempon okupis diskutoj en malgrandaj laborgrupoj elektitaj de la partoprenantoj mem.

La interes-grupoj evoluigis ĉirkaŭ sep ĉeftemojn: triamonda kaj fruaĝa klerigo, diskriminacia klerigo de junulinoj, klerigado pri moralaj valoroj, pacedukado, la rezultoj de la politiko de plurlingvismo, la rolo de teknologio en la klerigado, kaj klerigaj celoj kaj bezonoj en la Esperanto-movado mem. Pri ĉiu aparta temo mi nun koncize informos laŭ la raportoj de la laborgrupoj mem.

### Triamonda kaj fruaĝa klerigo

La grupoj pri triamonda kaj fruaĝa klerigo konstatis, ke ĉiuj infanoj estas kapablaj lerni tre frue, jarojn antaŭ la unua lerneja jaro, sed por ke tiu lernado estu efika, necesas specifa klerigado de la gepatroj por ke tion ili kapablu provizi. Ili pledas interalie por frua kleriĝo por ke la estontaj generacioj pli inklinu al daŭra kleriĝo. Ili konstatas, ke aparte en la tria mondo sufiĉa kvalita nutrado de patrinoj kaj infanoj estas evidenta antaŭkondiĉo por ke okazu tiu klerigado, kaj alvokas al esperantistoj kaj al ĉiuj fakuloj kontribui al la inventarigo, utiligo, adaptado kaj evoluigo de lerniloj en intima kunlaboro kun gekolegoj en la tria mondo, por ankaŭ lerni de ili kaj respekti la fakton, ke ĝuste ili plej bone konas la bezonojn. La grupo konstatis la gravecon de la revuo „Monda Forumo" kaj la kunlaboron tiucele kun „Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo", la esperantista Unesko-Asocio. La grupo parte profitis la fakan sperton de edukisto Maire Mullarney el Irlando, verkinto de pluraj libroj pri la frua edukado kaj politike aktiva en tiu kampo.



### Diskriminacia klerigo de junulinoj

Tiu laborgrupo konstatis post vigla diskutado, ke en plej multaj kulturoj la edukada sistemo spegulas la atendojn kaj sentemon de difinita socio. En pluraj socioj oni atendas malpli de la knabinoj ol de la knaboj, kaj malgraŭ teoria egaleco en multaj landoj, junulinoj spertas diskriminacion kiu ĝenerale estas nekonscia sed aperas en multaj situacioj. Se estas statistike demonstrebla la fakto, ke virinoj kutime ne atingas la saman nivelon de agado kaj rekono, kiun atingas la viroj, necesas enketi pri la kialo, la bazo de tiu situacio en la diversaj kulturoj. Necesas havi tiajn statistikajn raportojn, enketi pri jam faritaj esploroj en la diversaj landoj, kaj ekscii pri sukcesaj programoj kiuj kontraŭas problemojn de diskriminacio en la diversaj landoj. Aldonendas, ke ni rigardu sub tiu lumo la nunan staton de la agado kaj rekono de virino en la Esperanto-movado, kaj konsciu pri la influo de tiu kaj aliaj diskriminacioj kiujn la naciaj socioj trudas al nia movado. Al tiu diskuto aparte kontribuis el siaj fakaj scioj kaj spertoj doktorino Jane Edwards kaj Ans Bakker.

### Klerigado pri moralaj valoroj

En la hodiaŭa mondo, ŝanĝiĝoj en politikaj ideologioj kaj sintenoj al religio lasis ian moralan vakuon kiun necesas plenigi. Tamen, pro filozofia kaj kultura diverseco, ĉu ekzistas universalaj moralkriterioj, kaj se jes, ĉu kaj kiel ili estas instrueblaj?

La grupo tuj konstatis, ke kiam temas pri junularaj moralsistemoj, dogma instruado ne taŭgas. Etika konduto, moralo, kaj karaktero ne estas fakoj, kiujn oni povus instrui kiel aliajn studobjektojn. Pro tio la grupo proponas konsideron de la ekzempliga metodo, laŭ kiu la instruisto instigu al unuopaj gelernantoj pensi por si mem pri la sekvoj de moralaj decidoj. Oni uzu ekzemplojn de la ĉiutaga vivo, kaj la instruisto mem estu maksimume ekzemplo, por ke la ekzemploj ne estu evidente nur instrucele kreitaj por favori la personan moralsistemon de la instruisto.

En mondo de ŝajne tiom da negativaj influoj kiuj komenciĝas tiel frue pro televido, muziko kaj populara kulturo, denove gravas la gvida rolo kaj respondeco de la gepatroj rilate la instruadon de moralaj kvalitoj antaŭ ol fiksiĝos negativaj kriterioj malutilaj por la morala evoluo de la gejunuloj kaj la socio.

# RAPORTO PRI LA KONGRESA TEMO "KLERIGO POR LA 21-a JARCENTO"

## de la 78a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en VALENCIO

Dum la tuta kongresa semajno montriĝis daŭre vigla intereso pri la kongresa temo, „Klerigo por la 21-a jarcento". Vendredon matene cento da partoprenantoj plenigis la salonon Waringhien por aŭskulti raportojn de diversaj studgrupoj pri aspektoj de la temo kaj la resuman raporton de la reĝisoro de la temo.

Sekvas nun en tre koncizigita formo kelkaj el la konstatoj kaj rekomendoj de la laborgrupoj, kun kelkaj ĝeneralaj konkludoj. Jam de la unua tago, kiam la partoprenantoj indikis per kartoj demandojn, proponojn pri diskutindaj subtemoj, kaj eventualajn kontribuojn kiujn ili povus fari, montriĝis la seriozeco kaj klereco de la interesitoj. Kadre de la Internacia Kongresa Universitato ni aŭdis tri pritemajn prelegojn de konataj universitataj fakuloj: respektive doktorino Urueña pri „Klerigo por la 21-a jarcento en la internaciaj rilatoj" (fake adjunkta profesoro pri internacia publika juro en la hispana universitato de Valladolid); doktoro Maŭro La Torre pri netradicia eksterklaseja instruado pere de „Personigitaj malĉeaj instrusistemoj" (fake laboranta en la Tria Universitato de Romo pri lernotaksado kaj malĉea instruado); kaj doktoro Humphrey Tonkin pri la ŝanĝoj en tradicia instruado kaj lernado kiujn devigos „Nova jarmilo, novaj universitatoj".

Aliajn subtemojn mallonge enkondukis de la podio diversaj fakuloj, sed plej longan tempon okupis diskutoj en malgrandaj laborgrupoj elektitaj de la partoprenantoj mem.

La interes-grupoj evoluigis ĉirkaŭ sep ĉeftemojn: triamonda kaj fruaĝa klerigo, diskriminacia klerigo de junulinoj, klerigado pri moralaj valoroj, pacedukado, la rezultoj de la politiko de plurlingvismo, la rolo de teknologio en la klerigado, kaj klerigaj celoj kaj bezonoj en la Esperanto-movado mem. Pri ĉiu aparta temo mi nun koncize informos laŭ la raportoj de la laborgrupoj mem.

### Triamonda kaj fruaĝa klerigo

La grupoj pri triamonda kaj fruaĝa klerigo konstatis, ke ĉiuj infanoj estas kapablaj lerni tre frue, jarojn antaŭ la unua lerneja jaro, sed por ke tiu lernado estu efika, necesas specifa klerigado de la gepatroj por ke tion ili kapablu provizi. Ili pledas interalie por frua kleriĝo por ke la estontaj generacioj pli inklinu al daŭra kleriĝo. Ili konstatas, ke aparte en la tria mondo sufiĉa kvalita nutrado de patrinoj kaj infanoj estas evidenta antaŭkondiĉo por ke okazu tiu klerigado, kaj alvokas al esperantistoj kaj al ĉiuj fakuloj kontribui al la inventarigo, utiligo, adaptado kaj evoluigo de lerniloj en intima kunlaboro kun gekolegoj en la tria mondo, por ankaŭ lerni de ili kaj respekti la fakton, ke ĝuste ili plej bone konas la bezonojn. La grupo konstatis la gravecon de la revuo „Monda Forumo" kaj la kunlaboron tiucele kun „Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo", la esperantista Unesko-Asocio. La grupo parte profitis la fakan sperton de edukisto Maire Mullarney el Irlando, verkinto de pluraj libroj pri la frua edukado kaj politike aktiva en tiu kampo.



### Diskriminacia klerigo de junulinoj

Tiu laborgrupo konstatis post vigla diskutado, ke en plej multaj kulturoj la edukada sistemo spegulas la atendojn kaj sentemon de difinita socio. En pluraj socioj oni atendas malpli de la knabinoj ol de la knaboj, kaj malgraŭ teoria egaleco en multaj landoj, junulinoj spertas diskriminacion kiu ĝenerale estas nekonscia sed aperas en multaj situacioj. Se estas statistike demonstrebla la fakto, ke virinoj kutime ne atingas la saman nivelon de agado kaj rekono, kiun atingas la viroj, necesas enketi pri la kialo, la bazo de tiu situacio en la diversaj kulturoj. Necesas havi tiajn statistikajn raportojn, enketi pri jam faritaj esploroj en la diversaj landoj, kaj ekscii pri sukcesaj programoj kiuj kontraŭas problemojn de diskriminacio en la diversaj landoj. Aldonendas, ke ni rigardu sub tiu lumo la nunan staton de la agado kaj rekono de virino en la Esperanto-movado, kaj konsciu pri la influo de tiu kaj aliaj diskriminacioj kiujn la naciaj socioj trudas al nia movado. Al tiu diskuto aparte kontribuis el siaj fakaj scioj kaj spertoj doktorino Jane Edwards kaj Ans Bakker.

### Klerigado pri moralaj valoroj

En la hodiaŭa mondo, ŝanĝiĝoj en politikaj ideologioj kaj sintenoj al religio lasis ian moralan vakuon kiun necesas plenigi. Tamen, pro filozofia kaj kultura diverseco, ĉu ekzistas universalaj moralkriterioj, kaj se jes, ĉu kaj kiel ili estas instrueblaj?

La grupo tuj konstatis, ke kiam temas pri junularaj moralsistemoj, dogma instruado ne taŭgas. Etika konduto, moralo, kaj karaktero ne estas fakoj, kiujn oni povus instrui kiel aliajn studobjektojn. Pro tio la grupo proponas konsideron de la ekzempliga metodo, laŭ kiu la instruisto instigu al unuopaj gelernantoj pensi por si mem pri la sekvoj de moralaj decidoj. Oni uzu ekzemplojn de la ĉiutaga vivo, kaj la instruisto mem estu maksimume ekzemplo, por ke la ekzemploj ne estu evidente nur instrucele kreitaj por favori la personan moralsistemon de la instruisto.

En mondo de ŝajne tiom da negativaj influoj kiuj komenciĝas tiel frue pro televido, muziko kaj populara kulturo, denove gravas la gvida rolo kaj respondeco de la gepatroj rilate la instruadon de moralaj kvalitoj antaŭ ol fiksiĝos negativaj kriterioj malutilaj por la morala evoluo de la gejunuloj kaj la socio.

La junuloj mem, hejme kaj lerneje, lernu pripensi taŭgan moralsistemon, kiel ili ankaŭ lernu pli libere kaj kreeme pensi por ke ili komprenu ke ili havas la kapablon pozitive influi la mondkondiĉojn, same kiel la propran vivon.

**Pacedukado**

Gravas ke la gejunuloj mem lernu esprimi tiujn kvalitojn kiuj kondukas al interna paco, ĉar nur se ili sentas la propran valoron, ili estos pretaj rilati pozitive al aliaj kaj al propraj sentoj kaj sekvi universalajn modelojn kiel la „Kanta imperativo" kiun oni trovas en multaj religioj kaj filozofiaj sistemoj, nome ke oni traktu aliajn kiel oni deziras esti traktata. Necesas konscii ke kompreno pri alia kulturo kaj malsamaj kutimoj, sentoj ne venas nur pro komuna lingvo, kaj la esperantistoj konsciu la bezonon de specifa interkultura trejnado por konsciiĝi pri tio, kiel oni rilatu al personoj, kiuj apartenas al malsamaj kulturoj kaj havas malsamajn valorsistemojn.

**Plurlingvismo**

Bona ekzemplo de rezultoj kaj atentigoj estas la laborgrupo pri plurlingva edukado, kiu politiko aktuale viglas en Eŭropo kaj aliloke. La 20 kongresanoj el diversaj landoj, kiuj diskutis la temon dum tri kunsidoj, aprobas plurlingvecan edukadon kiel bonan metodon por disvolvigi internacian kunlaboradon, kiu mem kondukos al pli bona internacia konscio, tamen atentigas ke tiu plurlingveco rapide atingas siajn limojn pro lernkapableco, perdita tempo kaj kostoj. La tasko eduki al vera multlingveco estas evidente tre malfacile plenumebla, kaj en la praktiko provoj atingi uzon de pluraj lingvoj ofte kondukas al preferata uzo de unu el la gravaj ŝtataj lingvoj, kio kondukas rekte al diskriminacio kontraŭ la aliaj. Solvon al tiu problemaro prezentas Esperanto pro sia interalie propedeŭtika valoro por helpi lerni aliajn lingvoj. Tamen, por ke nia komunumo estu preta akcepti sian rolon tiurilate, necesas daŭre ampleksigi niajn laborfortojn, kaj disponigi pli da fakaj tekstoj utiligantaj la internacian lingvon.

**Teknologio**

Multaj parolintoj atentigis pri unu kerna fakto, ke tradicia instruado ne plu taŭgos por la 21-a jarcento. La rapida interdependiĝo de la mondo necesigas klerigon al tutmonda perspektivo, toleremo, kaj paco en la internaciaj rilatoj. Kaj en universitatoj kaj lernejoj gravas, ke la instruisto konsciu novan rolon kiel faciliganto de lernado. Tiu lernado povas kaj devas okazi diversmaniere, ĉu per tradicia instruado, viv- kaj laborspertoj, aŭ per utiligo de divers-specaj informretoj, ofte komputile bazitaj. Dum la lastaj tridek jaroj de la laboro de



doktoro Helmar Frank pri la teorio kaj didakta praktiko de la perkomputila instruado, okazis grandaj progresoj. Brilaj kolorekranoj kaj sono estas pli allogaj, kaj la teoria pristudo de la lernprocedo ebligis ĉiam pli efikan taksadon de la rezultoj kaj ankaŭ plibonigon de la instruado por adaptiĝi al la plej efika individuigita lernado. La forigo de geografiaj kaj tempaj limoj en perkomputila kaj videa lernado ebligis klerigon de amasoj kiuj ne havus la eblecon partopreni en normalaj altlernejaj klasoj.

**Klerigo kaj la Esperanto-movado**

Kaj fine, ni ne forgesu la signifon de tiuj demandoj por nia Esperanto-movado. Ankaŭ pri tiu temo okazis viglaj diskutoj pri ĝiaj diversaj aspektoj, spronitaj unuavice de Rudi Hauger de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj poste de Stefan MacGill de ILEI. Ĉu ni subtenas niajn proprajn organojn kaj organizaĵojn kiuj kuraĝigas fakan agadon kaj klerigadon pere de Esperanto? Ĉu ni turnas nin eksteren por partopreni kun aliaj individuoj kaj organizoj kiuj iniciatis kaj prilaboras tiujn klerigajn demandojn kaj tendencojn kiuj maturigos la cirkonstancojn favore al serioza, senantaŭjuĝa konsidero de la solvo kiun post jarcento de elproviĝo pretas proponi Esperanto? Ĉu ni konsciigos al la novaj lernantoj de Esperanto per la enhavo de niaj kursoj kaj lernmaterialoj pri la gravaj problemoj de la homa socio kiujn ili devos alfronti en la nova jarcento, ekzemple ekologiaj kaj homrajtaj? Kaj fine, ĉu ni havos la humilecon por konscii pri tio, ke ni ankoraŭ ne plensolvis tiujn problemojn en nia propra komunumo, sed ke tamen ni havu kaj la deziron, sindediĉon, kaj la kapablon pluevoluigi nian komunumon por montri al la mondo modelon kiu evidentiĝos ĉiam pli alloga, racia kaj necesa por kontentigi la bezonojn de nia nova morgaŭa tergloba socio.

Duncan CHARTERS

La plej ofta...
Eventoj
Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!
Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...
Petu senpagan provekzempleron de:
LINGVO-Studio, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario

## Landaj Sekcioj de ILEI

### en la jaro 1992

### (informoj ricevitaj el la enketiloj kaj dum la Konferenco)

1. **Albanio** – Albana Esperantista Instruista Sekcio, AEIS.

oni organizis plurajn kursojn en mezlernejoj kaj ĉe fakultatoj en kelkaj urboj; eĉ unu koresponda kurso; sekcio tenas kontaktojn kun la Instituto pri pedagogiaj esploroj kaj pluraj mezlernejoj kaj fakultatoj; oni ofte aperigas en la naciaj gazetoj artikolojn pri E-o kaj edukado; kelkaj publikaj prelegoj pri E-o; raportinto tre substrekas bonan kunlaboron kun la instruistoj pri la fremdaj lingvoj; sekcio tre proksime kunlaboras kun la kroata sekcio.

2. **Aŭstralio** – reprezentanto

kvarcento da esperantisoj kaj nur kvar profesiaj instruistoj de aliaj fremdaj lingvoj kiuj instruas E-on; Somera E-lernejo en Adeleide. Siatempe ekzistis LS de ILEI, sed pro malbona opinio pri IPR ĝi ne funkcias, sed la reprezentanto jam trovis ses personojn pretaj labori, espereble la sekvan Someran Lernejon vizitos sekretario de ILEI kaj la afero estos findiskutita. Granda subteno de pluraj universitataj profesoroj, unu inter ili jam elspezis sufiĉe multe da mono por starigi bibliotekon ĉe la Universitato en Melburno.

3. **Aŭstrio** – LS de ILEI

ne sendis informojn pri kursoj, ja oni scias pri tiuj kiujn ofertas IEM; cirkulero 1–3foje jare.

4. **Belgio** – LS de ILEI

dum la jaro oni okazigis dekon da elementaj kaj mezaj kursoj en kluboj kaj kelkajn en bazlernejoj; nova sekciestro

5. **Brazilo** – LS de ILEI

sume okazis 116 kursoj (elementaj 60, mezaj 40, superaj 10, koresponda 4, aliaj 20; membronombro plialtiĝis. Kunlaboras kun la Brazila E-Ligo kaj dum la naciaj kongresoj okazigas ekzamenojn; aperigo de informoj pri ILEI en la dumonata bulteno de E-Asocio de São Paulo; du fakaj kunvenoj dum la jaro (maje kaj oktobre)

6. **Britio** – Brita Asocio de Esperantistaj Instruistoj

sesio dum la Brita Kongreso; kunlaboro kun la eduka komisiono de EAB; aperigas trifoje jare „Esperanto Teacher"; ekspozicio pri E-o ĉe lingvaj foiroj en Londono, Manĉestero, Edinburgo kaj Novporto; senpagaj kursoj, semajnfinaj kursoj, unusemajna kurso en Barlaston.

7. **Bulgario**

sekciestro ne reagis, tamen ricevita mallonga raporto; diplomiĝis 10 studentoj en la fako Ingterlingvistiko en la Pedagogia Instituto de Vraca; ni esperas baldaŭ revigligi la agdon de la LS

8. **Ĉeĥio** – Pedagogia Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

ne sendis informojn pri kursoj; planita seminario kaj preparo por la ekzamenoj nuligitaj pro la neintereso; serĉata nova sekciestro



9. **Ĉinio** – Ĉina LS de ILEI

okdeko da membroj; aktivis dum la fakaj kunsidoj de la 2-a Ĉina E-kongreso kaj 5-a Pacifika E-kongreso; ekzamensesio kun 36 sukcesintoj (22 elementaj kaj 14 mezgradaj); kelkaj informiloj preparataj; pri la ekzameno aperis nacilingva informo kaj pluraj E-lingvaj; du renkontiĝoj por la membraro

10. **Finnlando** – Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj

kursoj okazis plejparte en klubejoj, 4 elementaj kaj 4 mezaj; membroj partoprenis plurajn E-seminariojn en Somera Universitato; komence de oktobro kaj novembre gramatikaj, lingvaj kursoj, Seminario en Popollernejo de Lahti (A. Pettyn); gazetartikolo en ĉiuj numeroj de la informilo de la landa asocio; en la loka radio ili ĉiumonate gastas en Tampere; kelkaj libro-ekspozicioj en bibliotekoj, librobazaro.

11. **Francio**

la sekcio ne funkcias; konferencano informis pri la kurso por 70-jaruloj; okazas kursoj ankaŭ en lernejoj, konversacia kurso en la sidejo de UFE.

12. **Germanio**

ne venis ia ajn informo; oni scias ke GEJ organizas kelkajn E-kursojn por la junularo; konferencanino informis pri la Afrika agado, kie ŝi tre aktivas.

13. **Hispanio**

bedaŭrinde ne venis informo de la sekciestro; trovita taŭga kaj preta persono por transpreni la gvidadon kaj plivigligi la agadon.

14. **Hungario** – Hungaria Asocio de Esperantistaj Instruistoj

konstanta membro-nombro (ĉ. 60); finitaj trijaraj kursoj ĉe ELTE kaj ĉe la Pedagogia Altlernejo en Szombathely; kursoj en kvindeko da elementaj lernejoj, trideko en mezlernejoj, dudeko en universitatoj kaj altlernejoj; konkursoj por lernejanoj; renkontiĝo por instruistoj: Pedagogiaj Tagoj; aŭtune cirkulero al ĉiuj aktivaj instruistoj.

15. **Izraelo**

oni ne havas informon pri la kursoj, ĉar eĉ se ili okazas, kursgvidantoj ne informas la Ligon.

16. **Islando** – - reprezentanto. Kvin membroj; kursoj ne okazas.

17. **Italio** – Itala ILEI Sekcio

dudeko da kursoj en ĉiuj tri gradoj; seminarioj en Firenzo kaj Nuoro dum la Kongreso; ekzamenoj en Massa, atestilon de la Katedro de Itala Instituto ricevis 40 personoj; Livorono, loka katedro 12 kandidatoj, Pisa, ĉe la universitato 8; kontaktoj kun la nacia organizo de AEDE; informoj en nacia gazeto; partopreno en la Federalista Eŭropa Movado kaj AEDE por substreki la bezonon de E-o.

18. **Koreio** – LS de ILEI

dekkvino da kursoj: fakultatoj 2, klubejoj 13; organizita vizito por la kursanoj al Japanio; pluraj kontaktoj kun diversaj instancoj rilate la ILEI-konferencon '94; dum la Korea E-kongreso en '92 12 instruistoj kunvenis kaj pridiskutis venontan agadon de la sekcio; ĉijare denova renkontiĝo.

19. **Kroatio** – LS de ILEI
dek membroj; dudeko da kursoj plejparte en bazlernejoj kaj klubejoj, sed ankaŭ en junularaj centroj en kelkaj urboj, eĉ kie estas ankoraŭ danĝere; internacia ekspozicio de E-infandesegnaĵoj en pluraj urboj; eldono de romaneto „Gerda malaperis" kun adaptita vortlisto; decembre IE en Zagrebo; kunlaboro kun albana LS kaj helpo al ili; kontaktoj kun pluraj eksterlandaj kursgvidantoj korespondcele; publikaj ekspozicioj en kelkaj urboj; enkonduka seminario komence de la lernojaro; partopreno en la Pedagogiaj Tagoj de la Hungara Sekcio; redaktado de pedagogia paĝo en la gazeto de KEU; kelkaj informoj pri la agado ĉe la ŝtataj radio kaj televido.

20. **Kubo**
la Asocio havas jam filiojn en 13 provincoj, nur unu ne; oni organizas E-kursojn dunivelajn, laŭ la intereso oni ofertas ankaŭ pliajn perfektigajn kursojn; kursoj daŭras 20 semajnojn, ĉiusemajne unu leciono; diversaj aranĝoj por la kursanoj; seminario por la kursgvidantoj, kutime unu jare, ĉijare du: unusemajna kurso por la jam spertuloj; al tiuj kiuj tamen ne posedas diplomon, oni donas pliajn lecionojn pri metodiko kaj kursofine okazas ekzamenoj. Alia kurso estas por interesuloj pri la instruado; al la kursgvidantoj oni sendas kopiojn de pluraj interesaj artikoloj, plejparte el IPR; prioritato de la Asocio estas tutlandigo de E-o.

21. **Nederlando** – Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto, NGGE
tri estrarkunsidoj kaj jarkunsido kun 15 partoprenantoj; studtagoj; la enketilo estis ne resendita pro la ŝanĝo de la sekciestro, nun respondecas la prezidanto, tamen oni deziras trovi novan personon; NGGE organizas sian internan enketadon kun pluraj informoj, bedaŭrinde el ĝi oni ekscias, ke pluraj ĉesis gvidi kursojn; kaŭzas problemon rilate al ekzamenoj, kiuj tre similas al IE, ke ne ĉiuj kursgvidantoj adaptiĝis al la novaj postuloj, leviĝis eĉ la demando, ke kursgvidantoj mem devus trapasi ekzamenojn; rigardante nombron de la partoprenantoj kaj sukcesintoj ĉe la ekzamenoj dum la lastaj 10 jaroj, rezulto iom ŝokas-falas; En la societo kies celo estas helpi al ĉinaj E-istoj partopreni E-aranĝojn, aktivas NGGE kun la celo ebligi al la ILEI-estrarano partopreni la venontjaran UK kaj ILEI-konferencon.

22. **Norvegio** – Norvega LS de ILEI
dudeko da membroj; kvin klubaj kursoj elementaj kaj bazaj; ekspozicio dum la instruista foiro.

23. **Novzelando** – reprezentanto
skribe reagis kaj promesis sendi la informojn iom pli poste

24. **Portugalio** – LS
organizita kurso por infanoj kaj en klubejo.

25. **Slovenio** – LS de ILEI
5 membroj; sep bazaj kursoj: bazlerneje 3, klubeje 2, meza 1 klubeja kaj unu ĉe la ŝtata televido ene de teleteksto; seminario por instruistoj, organizinto: Slovena E-Ligo, 12 partoprenantoj; oni ne sukcesis starigi kontaktojn kun iu ŝtata



instanco pro la ŝanĝo de la registaro kaj granda propagando de la angla lingvo; ĉiusemajna regula informado pri E-o kaj kursoj ĉe teleteksto.

26. **Svedio** – LS de ILEI
regulaj kursoj en la Popollernejo de Karlskoga; tre proksima kunlaboro kun Sveda E-Federacio kaj Sveda E-Instituto; pere de la nacia asocio partopreno en la granda ekspozicio por pedagogoj, lernejoj, administrantoj.

27. **Usono** – Usona Sekcio de Esperantistaj Instruistoj
84 membroj; 44 kursoj: en elementaj-bazaj lernejoj 9, fakultatoj 6, aliaj 15, mezaj fakultatoj 3, aliaj 5, supera fakultato 2, aliaj 1, koresponda 3; aliaj en hejmoj, bibliotekoj, preĝejoj, eĉ pertelefone; metodika E-seminario SFSU; plejparte unuopaj ekzamenoj en diversaj lokoj, korespondado; prezento de hungaraj infanoj ĉe talentaj infanoj; E-sesio ĉe la Jarkongreso de la Amerika E-Asocio de modernaj lingvoj en Novjorko; bulteno de AAIE kvarfoje; pluraj gazetoj nacilingvaj informas pri E-o; ekspozicioj ĉe urbaj bibliotekoj; renkontiĝoj dum la jarkunveno ĉe la universitato de Kalifornio, temo: „Kion profesiulo scias, kion ne profesiuloj devus scii?"

28. **aliaj sudamerikaj landoj**
tre modele agas Atiljo Orellana Rojas en pluraj sudamerikaj landoj kie li organizas Cseh-kursojn, li intencas viziti ankaŭ Afrikon.

Ĉi tie oni trovis la raportojn nur de tiuj sekcioj kaj landoj, kie ILEI havas reprezentantojn kaj nur se la koncernatoj raportis. La kompilinto dankas al ĉiuj kunlaborantoj!

Kompilis: Marija BELOŠEVIĆ

---

**Esperanto-Centro en Slovjansk**

En aŭgusto de 1990 en ukrainia urbo Slovjansk estis malfermita la unua ekssovetia privata supera lernejo – Internacia Instituto de Administro (IIA). Ĝia organizanto kaj posedanto, profesoro Fjodor Poddubnij perceptis ideon pri utilo de Esperanto en internacia entreprenado kaj komerco kaj subtenis fondon sub egido de IIA de Esperanto-Centro kaj enkondukon de la internacia lingvo en studprogramon de la instituto.

Nun en la instituto funkcias katedro de Esperanto, gvidata de profesoro Gennadij Ŝilo, en la katedro laboras dek instruistoj de la Lingvo Internacia. Pasintan lernojaron Esperanton devige lernis du mil studentoj de ĉeesta lernado. Ekde nova lernojaro ĝin devige lernos ankaŭ ses mil studentoj de koresponda lernado.

De la 20-a ĝis la 23 de junio 1993 Esperanto-Centro malavare subvenciita fare de F. Poddubnij organizis AIS-seminarion pri propedeŭtiko.

Adreso de la katedestro: Gennadij ŜILO, pk. UA–433206 Slovjansk

Adreso de la direktoro de Ukraina Sekcio de akademio Internacia de Sciencoj (UkrSAIS): Mikelo POPOV, UA–332440 Berdjansk, Melitopolska 4–12. Ukrainio.

## PENSOJ POST LA 41-a JARKONGRESO DE ELNA

**16–20 julio 1993, West Hartford, Connecticut**

1. Ĉiu lingvo devas esti la lingvo de iu komunumo.
2. Esperanto estas la lingvo de la tutmonda (aŭ "tergloba") komunumo.
3. En ĉiu komunumo oni devas eduki la loĝantaron pri la uzo de la komunuma lingvo
4. Estas pli facile eduki la infanojn kaj junulojn uzi la lingvon ol eduki la pli aĝajn personojn
5. Se oni volus instigi la infanojn kaj junulojn lerni kaj fakte uzi la lingvon, tiuj infanoj kaj junuloj devus loĝi en komunumo aŭ komunumeto kiu vere uzas la lingvon.
6. Tre bona situacio okazas kiam la familio estas komunumeto kiu ofte kaj daŭre uzas Esperanton.
7. Se infanoj kaj junuloj ne estas anoj de Esperanta familio, oni devas krei ĉiutagan Esperantan komunumeton en la klasĉambro aŭ alia medio de la infanoj aŭ junuloj. Sekve, la gvidanto de la komunumeto devus esti tre sperta Esperantisto kiu preskaŭ ĉiam uzas Esperanton en la komunumeto kaj kiu preskaŭ neniam uzas alian lingvon.
8. Se ne estus sufiĉe da spertaj Esperantistaj gvidantoj, eble per televido kaj moderna komunik-teknologio oni povus krei tutmondan kvazaŭ-komunumon, sed ĉe tio necesas ke la spektantoj ankaŭ partoprenu aktive, aŭ elektronike aŭ vidalvide kun aliaj spektantoj , por ke ili vere iĝu anoj de la kvazaŭ-komunumo.
9. Por instigi la daŭran lernadon de Esperanto devas ekzisti kelkaj vere valoraj spertoj per la uzo de la lingvo por la anoj de la koncerna Esperanta komunumo, kiel vojaĝado, tendarado, amuzado, kantado, komunikado kun foraj personoj, konatiĝado kun novaj amikoj, gajnado de novaj informoj, korespondado kun interesaj personoj kiuj uzas malsaman nacian lingvon, kaj tiel plu.
10. Rilate al la edukado de niaj infanoj kaj junuloj pri Esperanto, oni devas memori ke ili bezonas ne nur scipovon de la lingvo sed ankaŭ la ŝaton de la interna ideo de monda familio loĝanta kune kiel amikoj en nia tergloba komunumo.

**Ronald J. GLOSSOP**

**ERARLISTO**

Bv. korekti eraran lingvo-uzon en la artikolo 'Lingvo-politiko en tri aziaj landoj' aperinta en IPR 92/2, p. 16, kie 'situita' devus esti 'situanta' kaj 'evoluita' devus esti 'evoluinta'. La redakcio pardonpetas.



## Rondvojaĝo en sudamerikaj landoj

Plena je entuziasmo kaj vigleco, meze de junio mi decidis komenci novan vojaĝon tra sudamerikaj landoj, celante diskonigon de Esperanto kaj ankaŭ plifirmigon tie, kie jam ardas niaj torĉoj.

Tarija, en Bolivio estis mia unua provo veki atenton pri Esperanto...sed, kiel komenci? Kiun kontakti en nekonata medio? Tiaj estis miaj demandoj al mi mem en la momento kiam mi planis mian vojaĝon. La respondoj venis de si mem, tute neatendite. Kunvojaĝanto, kiu sidis apud mi, multe interesiĝis pri la signifo de mia verda stelo, kaj de nia babilado survoje al Tarija ekaperis panoramo antaŭe entute eĉ ne supozita de mi. Li kontaktis min kun la estro de la Plukleriga Fako de la loka universitato kaj kun membroj de baha'a religio. En la universitato mi povis alglui informilojn pri Esperanto kaj oni aperigis sufiĉe vastan artikolon pri nia lingvo en la universitata revuo. Aliflanke, baha'anoj aliĝis al perkoresponda kurso de Argentina Esperanto-Asocio.

En Sucre estis forta intereso en la Fakultato pri Turismo, Lingvoj kaj Lingvistiko. Estis planita publika prelego en universitata ejo, tamen en tiuj tagoj la lando estis skuata de firmaj protestoj flanke de profesoroj kaj studentoj, kaŭze de kio oni fermis ĉiujn universitatajn ejojn por eviti fiagojn en ili flanke de ekstremuloj...kaj tiel, la prelego fiaskis.

La Paz akceptis min meze de belega suna tago kaj neĝo sur la impona monto Illimani. Tie mi renkontiĝis kun la UEA-Delegito, doktoro Arze. Lia agado por Esperanto daŭre estas limigita pro profesiaj kialoj. Taksio jam atendis min por konduki min al flughaveno, kiam ĉe la hotela enirejo aperis virino demandante pri mi. Temas pri perua pentristino, el Tacna, kiu hazarde troviĝis en La Paz por turismi kaj tie aŭdis pri mia vizito. Tiel ekrealiĝus ŝia dejara revo: lerni Esperanton. La mallonga vojaĝo kaj posta atendado sufiĉis por klarigi iom al ŝi pri Esperanto, interŝanĝo de adresoj kaj, vere, por multe pli kreskigi ŝian intereson por nia lingvo.

Dum ĉi tiuj vojaĝoj miaj, mi ĉiam portas stoketon da flugfolioj pri Esperanto kaj algluas ilin ĉe la hotela akceptejo. Tie mi indikas mian ĉambronumeron, kaj tiel plurfoje okazis, ke mi renkontiĝis kun esperantistoj, kaj alproksimiĝis al mi multaj homoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto.

Koĉabamba estis ja inter miaj planitaj haltoj en Bolivio. Tie atendis min la membroj de la pasintjare fondita membraro de Koĉabamba Esperanto-Asocio (KEA). Jurnalo *Opinión*, redaktata en Koĉabamba, tamen distribuata naciskale, akceptis aperigi artikolon pri Esperanto, kaj tiel diskoniĝis multo pri la agado de KEA. Estro de la Lingvistika Fako de la Nacia Univ ersitato San Simón malfermis al mi la vojon al universitata publiko, permesante prelegon tie. Mi, do prelegis, emfazante, kial ni proponas internacian lingvon, kaj kial ni opinias, ke Esperanto estas taŭga por plenumi tian rolon. Membroj de la Studenta Centro multe kontribuis al diskonigo de la evento.

Dum mia restado en Koĉabamba mi povis ĉeesti la kunvenojn de KEA. Tiam okazis renovigo de la estraro, la nuna prezidanto estas f-ino Rosario Cárdenas Núnez del Prado. Samtempe mi deziras informi, ke la nuna kaj nova poŝta adreso de KEA estas: Castilla 2550, Cochabamba; Bolivio.

La grupo decidis transpreni la taskon okazigi a 2-an Sudamerikan Tendumadon de Esperanto. Ĝi estos komuna aranĝo de Argentina Esperantista Junulara Organizo (AEJO) kaj la bolivia grupo. La Tendumado realiĝos de la 3a ĝis 9a de januaro 1994, kaj ĝi estas anoncata samtempe kiel la 1a Renkontiĝo de Boliviaj Geesperantistoj. Ĉi tio estas la unua paŝo en la vojo al la starigo de pli firma organizo mem en la lando.

La Tendumado okazos fakte ne en tendoj, sed en domo. La privata Universitato *Univalle* aŭspicios la eventon kaj pruntos studĉambrojn por niaj kunvenoj kaj ankaŭ la restoracion. La restadejo funkcios en apuda studenta hejmo je vere malaltegaj prezoj. Estas planata migrado tra la valo kaj por la plej aventuremaj okazos tritaga ekskurso post la Tendumado al El Chapre, ĝangala regiono. Tio kalkulos je gvidado de ekologo, kiu laboras en diversaj projektoj por daŭra konservado de niaj sudamerikaj arbaroj. Ĉiuj interesitoj povas sin turni rekte al la adreso de KEA.

De mia vidpunkto, ĉi tiu okazaĵo estas grava en la evoluo de la kunlaboraj rilatoj inter LS de TEJO kaj LA en Sudameriko. En momento, kiam nia *Mercosur* ekaperas kaj oni faras la unuajn paŝojn por la ekonomia kuna agado inter ĉi tiuj sudaj landoj, tutcerte Esperanto-organizaĵoj ne povas resti komplete for de tiaj historiaj paŝoj.

Santa Cruz de la Sierra estis mia lasta halto en Bolivio. Tie, la Plukleriga Fako de la Universitato NUR invitis min al gvidado de baza E-kurso en baldaŭa estonteco. Aliflanke, mi renkontiĝis kun baha'anoj, kiuj multe interesiĝis pri E-o kaj jam nun ricevas E-materialon por perkoresponda lernado.

Forlasinte Santa Cruz, mia sekva vojaĝcelo estis Sào Paulo, en Brazilo. Tie mi ĉeestis la 29-an Brazilan E-Kongreson, kie mi aktive partoprenis gvidante du seminariojn por la interesiĝantoj pri Cseh-metodo, gradoj A kaj B.

Grava kunveno efektiviĝis dum la Kongreso. Ok reprezentantoj de Landaj Asocioj, el Brazilo, Urugvajo kaj Argentino, kunvenis por esplori eblojn pri konkreta kaj fakta kunlaboro inter niaj landoj. Tiam mi informis pri mia ĵus finita agado en Bolivio, pri la junulara Tendumado, kiel pliaj paŝoj en la sudamerika integriĝo. Estas planata kunveno en Bonaero dum pasko 1994 por reprezentantoj de LA en Sudameriko.

Post tiu Kongreso mi vojaĝis al Ribeirao Preto, malgranda industria urbo, situanta 319 kilometrojn okcidente de Sao Paulo. Tie okazis la Unua Semajno Esperantista de Ribeirao Preto, kiam mi gvidis bazan kurson por komencantoj. La kurso estis vere internacia, ĉar ni kalkulis je la ĉeesto de brazilanoj, italo kaj kubanino. Dum tiu semajno, la akademiano Geraldo Mattos gvidis matene kurson pri la historio de la E-movado kaj vespere pri E-gramatiko.



Loka radiostacio, Tropika Radio FM, dum unu horo intervjuis la motoron de la Semajno Esperantista, nome Neusa Priscotin Méndes, la vicprezidanton de UMEA, doktoron Roberto Rezende kaj min. Mia intenco estis tuja forlaso de Ribeirao Preto post la finiĝo de la aranĝo tamen... dum la semajnfino okazis populara kurso pri homeopatio en Esperanto kaj portugala lingvoj. Mi restis pro tio kaj tuj poste devis komenciĝi la 49-a Tutamerika Kongreso de Homeopatio. Semajnfine estis jam alvenintaj la kongresontoj, kiuj multe interesiĝis pri Esperanto, kaj tiel mi akceptis resti plian semajnon por gvidi alian kurson por tia faka publiko. Dum la Homeopatia Kongreso staris budo de Brazila E-Ligo kaj eĉ en ĉiu kongresa teko troviĝis dokumentoj en kaj pri E-o, interesaj diskonigiloj en neesperanta aranĝo. Speciale plaĉis al mi la homeopatia terminaro trilingva: Esperanta, portugala kaj hispana.

En Ribeirao Preto funkcias modela Kultura E-Centro, ĉe la stacidomo mem, tiel, ke ĉiu vojaĝanto havas la eblon alproksimiĝi. Inda je mencio estas la Instituto Homeopatia François Lamasson, pro la meritoplena laboro favore al nia lingvo: tie funkcias E-departamento, ĉar oni instruas regule la lingvon al estontaj homeopatoj, kaj cetere, oni eldonadas la revuon „Homeopatia esplorado", kiu estas dulingva (E-a, portugala).

Post tio, la Kultura Centro el Campinas akceptis min por prelego, kiam mi pritraktis la edukadon al niaj indianaj komunumoj. La grupo vigle aktivas en tiu laboro kaj ofte kunvenadas.

Mia lasta etapo estis urbo Baurú. Tie mi gvidis fulman kurson por la loka grupo kaj mi renkontiĝis kun kelkaj aktivuloj. Vere menciinda estas la laboro de Cláudia Pontes Amêndola, kiu de jaroj zorge okupiĝas pri produktado de ludiloj por instrui E-on kaj nun ŝi jam kalkulas je vera arsenalo de tia materialo, kiun ŝi utiligas kadre de siaj kursoj por infanoj.

Revene al mia urbo, nepra halto estis Bonaero, jam en Argentino. Tie mia kontakto kun la loka klubo naskis la ideon pri instruado dum la septembraj semajnfinoj. Tiel, do, mia agado en la instrua kampo ne ĉesas.

Du laborigaj monatoj plenaj je diversflankaj spertoj jam pasis; nun atendendas la sekvoj: gravas la naskiĝanta kunagado de niaj landaj organizaĵoj, kiuj nun serĉas iom pli strukturan kontakton, kaj la senpaŭza konigo de E-o en niaj landoj.

Por konstante antaŭenigi nian laboron por diskonigi E-on en Sudameriko, ni ja bezonas la konstantan malavaran helpon de nia tutmonda E-komunumo. Memoru, ke ĉe UEA nun ekzistas Fondaĵo AMERIKO, kaj vi povas ja sendi vian mondonacon al ĝi. Tio ja helpos en la realigo de diversaj projektoj en nia kontinento.

**Atilio ORELLANA ROJAS**
Casilla de Correo 1428
RA-5000-Córdoba, Argentino

**Informoj el Togolando**

La klubo ESPERO de Anyronkope (vilaĝo en la sudo de Togolando) eluzis la okazon de ĉeesto de s-ro GBEGLO Koffi por okazigi kurson de la 12a de majo ĝis la 21a de junio 1993. Trideko da gejunuloj partoprenis; post trastudo de la libreto *Zagreba metodo*, 16 trapasis eĉ kurso-finan ekzamenon skribe kaj parole.

*el raporto de Delfeno TIETTI*

**Aranĝo planata por neglektata celgrupo**

Partoprenantoj de Printempaj Semajnoj Internaciaj, celitaj al familioj kun junaj infanoj konstatis, ke la ekjunuloj inter 12 kaj 16 jaroj estas neglektataj, pro tio oni planas okazigi apartan aranĝon por ili en la proksimeco de la PSI. Ĝi laŭeble similu al la ILEI-gimnazio: matene iom da instruado kaj posttagmeze adekvata libertempado.

Estas serĉataj geinstruistoj, kiuj aŭ tuttempe okupiĝus pri la gelernantoj aŭ preferos partopreni PSI-on kaj dum kelkaj horoj doni lecionojn al la ekjunuloj. Interesiĝantoj turnu sin al: Wolfgang Loose, Irisweg 12. DE–59439 Holzwickede, T: 02301–6020

*el Esperanto kaj instruado de AGEI*

**Subvencioj**

*The Norwich Jubilee Esperanto Foundation* subvencias ĉiujare ĝis proksimume dek junajn britajn esperantistojn por vojaĝi al kongresoj, somerkursoj ktp. Ĝi povas ankaŭ disdoni premiojn al gejunuloj kiuj montras neordinaran Espe rantan lingvokapablon. Krome, ĝi povas subvencii britajn instruistojn de Esperanto kiuj deziras esplori instrumetodojn kaj intencas publikigi raporton pri siaj eltrovoj. Same povas esti subvenciataj junaj alilandanoj kiuj deziras vojaĝi en Britio por prelegi aŭ paroli neformale en Esperanto.

*el Esperanto Teacher*

**Tutmonda Homaranista Adresaro**

La mondkonata verkisto Umberto Eco diris: "Kompare kun aliaj projektoj de internacia lingvo, malantaŭ Esperanto estas iu ideologio, kio klarigas kial ĝi eltenis dum la aliaj fiaskis. Ekzistas Esperanta 'religio', kiu igas homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas 'religio' de Volapük aŭ de Ido. La anglan oni lernas nuntempe pro praktikaj kaŭzoj. Sed povas ekzisti ideaj instigoj kiuj decidigas lerni lingvon, kaj ili estas fortaj." "Mi uzis la vorton *ideologio* en tre larĝa senco: aro de ideoj, de opinioj."

Zamenhof skribis: "Lingvo internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato **lingva**, la homaranismo volas krei tian saman ponton en **ĉiuj** rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri."

Info-Servo celas ebligi kontakton inter ĉiuj, kiuj interesiĝas pri homaranismo. Tial ni preparas **Tutmondan Homaranistan Adresaron.** Se vi deziras registrigi vian adreson en tiu ĉi adresaro, bv. sciigi vian adreson al: Info-Servo, Bismarckstr. 28, D–35037 Marburg, Germanio.



## KALENDARETO

**Dec.** 10-12. 42-a Kultura Semajnfino. Org. Sarlanda E-Ligo. Triŝtupaj kursoj kun K. Burgera, K. Barkovic, E. Borsboom; leksikologiaj, -grafiaj prelegoj de E-D. Krause. Apartaj porinfanaj programoj. Senpaga ĝis 26jaroj. Sarlanda E-Ligo, r.a. Querstr. 11.D–6607 Quierschied

**Dec.** 31.–Jan. 02. 3-a Mediteranea Konferenco de Esperantologio. Org. Esperanto-Ligo de Israelo kune kun Kooperativo de Literatura Foiro kun la aŭspicio de la Tel-Aviva Universitato. Ĉeftemo: Zamenhofologio. Tuj antaŭ la Konferenco okazos la tradicia jarkunveno de ELI. Esperanta PEN-Centro, Pf. 117. H–1581 Budapest

**Jan.** 4–9. 1994. Nov-Zelanda E-kurso en Auckland. Brian kaj Jackie Fox, 634 South Titrangi Road, Auckland 1007.

**Jan.**10.–22. Aŭstralia E-Somerkursaro en Adelaide. Kursestroj: V. Payne, Sh. Gradussov, M. Chaldecott, So Gilsu. Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney, SA 5059 Australia.

**Jan.** 17.–22. Aŭstralia E-Kongreso en Adelaide. v. supre.

**Jan.** 23.–febr. 03. Aŭtobusa kaj junulargasteja karavano de Adelaide al Melbourne, Canberra, Sydney, Surfers' Paradise kaj Brisbano. vidu supre.

**Jul.** 23–30. Universala Kongreso en Seulo. Unua bulteno aperis.

**Jul.** 30. – 5. aŭg. 28a Konferenco kaj 3a Gimnazio de ILEI, Universitato Kangnam, Koreio. Pluaj informoj sekvos!

## Kvara vigla jaro por la ekzamenoj

Sepdek naŭ sukcesintoj estas registritaj ĝis nun por 1993 en la ekzamenoj de UEA/ILEI. Ĉiuj sesioj okazis somere, kaj, kiel jam fariĝis kutima, en tri kontinentoj: julie en La Chaux-de-Fonds (Svisio, kun 6 elementaj kaj 7 mezaj sukcesintoj), en Sanfrancisko (Usono, 2 kaj 1); aŭguste en UK (Valencio, Hispanio, 2 kaj 6), IJK (Vraca, Bulgario, 1 kaj 1), Barlaston (Britio, 5 kaj 0) kaj Ĉengde (Ĉinio), 42 kaj 0. Septembre sekvis Sète (suda Francio) kun 1 kaj 5: sume 59 elementaj kaj 20 mezaj sukcesintoj. Ĉengde sekve iĝas la plej granda sesio ĝis nun, superante la antaŭan ĉinan rekordon de 36 pasintjare. Jarprotokolo, inkluzivonte sesion en Zagrebo decembre, aperos komence de 1994.

Ekde tiam atendeble funkcios nova ekzamena sekretario, prof. Ivan Bekavac-Basic el Zagrebo, filozofo kaj instruisto de la latina en medicina mez-lernejo. Malcentrigo pluiros sub la gvido de kontinentaj respondeculoj: s-roj Gbeglo Koffi el Togolando por Afriko (v.p.32), Orellano-Rojas Atiljo el Argentino por Latin-ameriko (v.p. 29-31) kaj nia vic-sekretario prof. Zhang Danchen plue por Azio. Sinprezenta artikolo pri tiuj novaj agantoj aperos en revuo *Esperanto* kaj IPR. Sesioj por 1994 estas jam petitaj de Brazilo, Finnlando kaj Ganao, aldone al la jam tradiciiĝintaj sesilokoj.

smg, aganta sekretario, IEK

## INSTRUISTAJ KURSOJ

La tritaga kurso pri komunika instruado bazita sur la lernolibro *Tendaraj tagoj* sukcese okazis en la budapeŝta klubo 'Esperejo' fine de septembro. Dek du kursanoj el Hungario (ĉefe el la provincoj), Kroatio kaj Germanio vigle diskutis plej diversajn temojn – gramatikajn, didaktikajn, varbajn ktp. Plie ili devis plenumi donitajn rol-ludojn, kio estis preludo al la pli defia tasko mem verki kaj gvidi proprajn rol-ludojn. En grupoj ili devis kunlabori por krei instru-tabelojn kaj solvi praktikajn problemojn. Tio donas ideojn, kiel paroligi proprajn kursanojn.

Tamen la dua okazigo de la kurso en Poprad oktobre estis nuligita pro manko de partoprenantoj. ILEI planis por 1993 oferti 50 lokojn en instruistaj kursoj. Ofertinte kvar kursojn ĝi ja faris tion, sed nur tri kursoj realiĝis kaj altiris 3 + 12 + 12 = 27 kursanojn.

## ALIROJ AL LA ITALA PARLAMENTO

Iniciatoj de la Radikala Partio en Romo rezultis en akcepto de parlamenta dekreto, kiu starigas komisionon por esplori la propedeŭtikajn valorojn de Esperanto kaj la valoron instrui ĝin pro siaj propraj meritoj. Pluraj el la komisionanoj estas mem esperantistoj. La parlamento asignis ok milionojn da liroj por la esplorlaboro, kiu devos atingi konkludon ĝis la mezo de 1994.

Alia pli frua propono pri instruado en elementaj lernejoj en kelkaj landoj (Valonio, Hispanio, Nordrejno-Vestfalio) estas revivigita kaj eventuale stariĝos, se partneraj lernejoj estos trovitaj.

ILEI proponis kunlabori en tiuj projektoj, precipe en la kursoj de instruista trejnado, kiun la dekreto specife antaŭvidas.

## ESPERANTO-EKZAMENOJ EN BRITIO NULIGOTAJ

Plie al la komuniko en la antaŭa IPR, Esperanto en 1995 estos forprenita el la oficiala GCSE ekzamenoj – en la lastaj jaroj la nombro de kandidatoj variis inter 20 kaj 40. La solaj aliaj lingvoj kun tiom modesta klientaro estas la guĝerata kaj la ukraina, kiuj estas respektive forstrekita kaj -ota. La tria plej nepetata lingvo estas la pola, kun meze 200 kandidatoj jare, kaj tio estus la minimuma nombro, kiun Esperanto devus allogi por savi la ekzamenon. La brita sekcio organizis en oktobro tritagan kurson specife por pretigi kandidatojn, por altigi la nombron da sukcesintoj en la lastaj du jaroj de oferto.

**VORTARO DEZIRATA EN LA REDAKTEJO!**

La redaktan laboron de IPR kaj *Juna amiko* kaj libro-pretigadon suferas pro manko de vortaro PV aŭ PIV en la klubejo Esperejo. Se sur breto aŭ en kolekto ie kuŝas neuzata aŭ ne plu bezonata ekzemplero, pensu pri la ebleco donaci ĝin al ILEI por faciligi nian laboron! Anticipan dankon!



**Recenzoj**

## Distanca Trejnado de Instruistoj

La speciala duobla numero 8-9 (somero 1993) de la itala fakrevuo *Istuzione distanza* (distanclernado) jam per 220 paĝoj atingis librajn dimensiojn. En la kvina jaro de apero ĝi arigas fakajn artikolojn el la tuta mondo, prezentas ilin per altnivela prestekniko kun koncizaj resumoj en la angla, franca, hispana, germana kaj Esperanto. La nuna numero prezentis la temon *Distanc-trejnado de instruistoj* (DTI), per la sekvaj kontribuaĵoj:

*Italio:* Leĝo el 1990 malfermas trejnkursojn por instruistoj ĉiunivele en universitatoj. Ĉar dubeblas la kapacito tie plenumi la bezonon, oni esploras DTI-kursojn, kiuj jam havas du prototipojn (vidu p.1-8 de la nuna numero).

*Argentino:* Kiel instensigi dudirektan komunikadon en DTI.

*Aŭstralio:* Komparo de skriba-telefona kun vizaĝ-al-vizaĝa interago, konkludante, de DTI povos efike funkcii por granda parto de tuta kurso. Izoleco gravigas la rolon de DTI.

*Kanado:* Komputiloj kaj alt-teknologio en DTI.

*Ĉinio:* Rolo de satelit-televidaj kaj korespondaj kursoj de DTI.

*Kolombio:* Naŭ-semestra DTI programo pri lerneja inspektado.

*Francio:* DTI por instrui pri la uz-teknikoj de vidbendoj en lingvo-instruado; superrigardo de DTI nuntempe en Francio.

*Britio:* Kazo-studo de Universitato Brunel; DTI estas sendube kostefika, sed ĉu ĝi sukcese trejnas instruistojn? Spertoj el Britio, Pakistano, Srilanko, Indonezio, Nigerio, Zimbabvo.

*Honkongo:* Ekspeansio de DTI prepare al la transformo de 1997.

*Israelo:* Komunaj stud-ĉambroj en lernejoj por DTI-instruistoj.

*Hispanio:* La 57 DTI-kursoj de la Nacia Universitato de Distanc-Edukado (UNED); rezultoj de ĝiaj televidaj kaj teletekstaj kursoj.

*Srilanko:* Centra DTI-programo por trejni sendiplomajn instruistojn.

*Usono:* Aŭd-skribaj komputilaj DTI-programoj por instruistoj en kamparaj regionoj; kursoj por instruistoj en Alasko (85% DTI) pri edukado de handikapuloj kaj junuloj el minoritata kultura fono.

*Turkio* DTI por 130.000 elementaj kaj 54.000 alt-lernejaj instruistoj.

Por aboni aŭ pli da informoj, kontaktu d-ron Maŭro La Torre, kiu estas unu el la redaktoroj de la periodaĵo (adreso, p.8).

* * * * * *

*Kiel fidela hundo,* Antonio Ruiz Negre (1938- ). Tradukis Adrián Manas Codes. 93p. Valencio, 1993. Ĉi tiu verketo ricevis ekster-meritan konatecon inter la esperantistoj, ĉar ĝi estis distribuita senpage al ĉiuj aliĝintoj de la 78a Universala Kongreso en Valencio.

Enhave la duakta komedio pri homaj sintenoj al riĉeco estas en ordo, la libro havas plaĉan aspekton, sed ne indas plue recenzi tion pro la mizera lingva nivelo, kiu igas ĝin danĝera en la manoj de lernantoj. Preterlasante la svarmon da preseraroj (krom unu, kiam kelnero prenas botelon kaj preparas trikaĵojn!) kaj centojn da mislokitaj aŭ mankantaj supersignoj (kompensataj iomete per 'ŝportautomovilo' kaj 'ŝerĉis', ekzemploj de gravaj mankoj estas:

**Hispanismoj:** konstitui, escenejo, preokupiĝi, renonco, tendre, ingresi, demontri, destino (por vojaĝcelo). **Ĉu hispanismoj?**: rujnigas, ripentante, ripiti, flarta, elpezi kaj elzpezi.

**Transitiveco:** kie la agado disvolvas; telefono kompletas la tuton; la nokto ne komencis; ĉu mi povas preti viskion; la konversacio komencas interne; nenio rekomencos; vi ŝanĝis neniom; ili [esperoj] realigas se ni volas; li haltiĝis; la skizo bezoniĝos lian intervenon; la paso de tempo sanĝiĝos vian opinion; vi povus interesigi lin; vi glaciiĝas min; vi surprizigas min; ni prokrastigis ilin; ni finigas la diboĉon ktp. La kunteksto nenie pravigas tiujn 'ig'-ojn.

**Misuzo de -N:** tiom da hotelojn; vi estas la solan eblon de savo kiu la bonŝanco sendis al mi; la valutoj oni vendu; el la oficejo eliris neniun informon; ŝanĝante al festan tonon; mi havas kopiojn el kelkaj dokumento (kaj pluraj similaj misakordoj); estas aferojn, kiujn... (ripete -N kun 'estas'), li trinkas unu fojo (ripete tiaj eraroj); por transporti ambaŭ-n, ktp...

**Miselekto de vortoj:** oferi/oferti; ŝargi/ŝarĝi; kunsenti/konsenti; feltoj/peltoj.

**Stranga uzo de 'el':** Memoru, ke el nun (ekde); mi mendis el li (de); ...la koverton, kiun Rikardo forprenos el ŝi (Rikardo ne estas ĥirurgo!); tio plaĉas al mi el kelkaj viroj (?).

**Stranga uzo de 'aparta':** li iras al sofo kaj apartas el tie la manvalizon. ...malfermas ĝin kaj apartiĝas cedante pason al Rikardo, Mi apartigos vin antaŭ ol morgaŭ el via politika brakseĝo. (kaj ripeta misuzo de 'antaŭ ol')

**Stranga uzo de imperativo:** mi avertos vin kiam mi bezonu vin, ktp.

**Mikso adjektivo/adverbo:** ĉio estas tre bone; ne estus grava, ke; estas bona trovi, ktp.

Resume, averaĝe du/tri fundamentaj eraroj paĝe detruas ĉi tiun verkon; ILEI devas emfaze malrekomendi ĝin por kursa uzo, krom kun spertuloj sub ekzerco-formo 'elsarku la erarojn'. Vi distriĝos je juvelaĵoj kiel: "Vi estas blinda, Bernardo, vi ne vidas pli eksteren ol viaj nazoj."! Ni devas supozi, ke la CO de UEA kaj LKK-anoj permesis ĝian distribuon ne vidinte ĝin anticipe — pli rigora kontrolo necesas. Enurbaj esperantistoj bezonus du minutojn konstati ĝiajn mankegojn kaj nur kelkajn horojn levi ĝin ĝis almenaŭ akceptebla nivelo. Kadre de la UK prezentiĝis kaj eĉ skoliĝis bunto da iberia verka talento, kia domaĝo ke verkaĵoj de ili, zorge provlegitaj, ne povis trovi la vojon al la kongresteka regalo.

*De vilaĝo al ĉefurbo*, Gbeglo Koffi. Eldonis Fondaĵo Afriko de UEA, 1993. Historio de la malfacila vojo de inteligenta kampara knabo al scio kaj klero. Verkita en la sama freŝa kaj klara stilo, kiu markis la unuan verkon de Koffi, *Mi vizitis grandan urbon*. Mendu la nunan verkon de UEA: 8,10 gld, kun triona rabato ekde tri ekzempleroj.

*Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado*, Mag. Irena Szanser, Varsovio. Eldonis ILEI, 1993. 174 paĝoj, ilustrita, firme bindita. Jen la unua nova baza metodika libro de post la apero de Rakusa antaŭ 25 jaroj. IPR mendis recenzon, kiu aperos en estonta numero. Koncize, ĝi havas tri sekciojn, la unua prezentas la historion de didaktiko, difinas bazajn nociojn kaj kognitivan edukadon; la dua sekcio estas la plej ampleksa kaj prezentas manierojn krei lecion-planojn, diskutas la rolon de la instruisto, la influon de lingva interfero ktp; la tria traktas psikologiajn faktorojn en la lern-procezo.

Prezo ĉe UEA kaj ILEI: 24 NLG. Ĉe UEA sesona rabato ekde 3 ekz. Ĉe ILEI 20 NLG ekde 3 kaj 16 NLG ekde 8 ekz. Por reform-eŭropanoj aĉetebla de ILEI por 600 hungaraj forintoj.

La libroservo de ILEI aperigis mendilon por siaj propraj verkoj kaj kelkaj interŝanĝe ricevitaj. La supra verko estas ricevebla laŭ tio (kun la menciitaj rabatoj). En tiu mendilo aperas erara prezo por la kvanta livero de *Tendaraj tagoj II*, po 8 NLG anstataŭ 10 NLG. Por instigi nin ne erari denove, ni liveros je tiu pli favora prezo al mendantoj, kiuj uzos tiun mendilon ĝis la jarfino. Do, se vi mem ne abonas la revuon *Juna amiko*, trovu iun, de kiu prunti ĝin!



# SEKCIESTROJ DE LA LIGO

**Albanio:** Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
**Argentino:** Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
**Aŭstrio:** Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
**Belgio:** Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
**Brazilo:** Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
**Britio:** Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
**Bulgario:** Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
**Ĉehio:** Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, 625 00 Brno
**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
**Estonio:** Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
**Finnlando:** Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
**Francio:** S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, F-74920 Combloux.
**Germanio:** Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, DE-W-8900 Augsburg *(ebla ŝanĝota)*
**Hispanio:** Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
**Hungario:** Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
**Israelo:** Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
**Italio:** Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
**Japanio:** *vakas kaj forstrekota.*
**Korea Resp.:** So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
**Kroatio:** Zdenka Svetličić, Kroatia Esperantista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb
**Kubo:** H. Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C.Habana.
**Nederlando:** D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe *(ebla ŝanĝota)*
**Nordameriko:** Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
**Norvegio:** *Turnu vin al* NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
**Pollando:** p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw 17
**Portugalio:** D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
**Rumanio:** Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, RO-1900 Timisoara
**Sanmarino:** Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
**Slovakio:** Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad
**Slovenio:** Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
**Sud-Afriko:** *vakas*
**Svedio:** Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby
**Svislando:** Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
**Venezuelo:** Prof. Juan Eduardo Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
**Zairio:** Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire)

# REPREZENTANTOJ DE ILEI

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
**Aŭstralio:** Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
**Bangladeŝo:** Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
**Centrafrika Respubliko:** Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
**Ĉilio:** Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
**Hindio:** Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
**Irano:** Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
**Islando:** Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
**Jugoslavio:** Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
**Kostariko:** Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
**Litovio:** Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
**Niĝerio** Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
**Nov-Zelando:** 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
**Tanzanio:** Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
**Togolando:** Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
**Ukrainio:** Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.

## LABORKOMISIONOJ

**Didaktikaj ludoj:** Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle.
**Ekzamenoj:** Elementa kaj meza niveloj : Sekretario ĝis fino de 1993: S. MacGill
Supera nivelo: Sekretario serĉata.
Prezidantaro: d-ro Till Dahlenburg plus du nomotoj de UEA.
**Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj:** Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666 62 66.
**Gazetara servo kaj informado:** *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36 86 29.
**Konkursoj lernejaj:** Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet.
**Lerneja kontaktigo kaj statistikado:** Provizore Budapeŝto plenumas. *Ni traktas kun nova plenumanto en Usono.*
**Statuto:** Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15 65.
**Terminologio:** *vakas*
**UN-Jaro de la Familio 94:** Glossop-MacGill

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**UNESKO:** (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
**UEA:** Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
**IEI:** Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.
**KCE:** Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.
**ECP:** Esperanto-Centro Poprad, Sobotske nám. 6, 058 01 Poprad, Slovakio. Konto: 18431-563/0200 de Vŝeoecna ŭverova banka, Poprad.

## KONTRIBUAĴOJ AL IPR

**Kontribuaĵoj al IPR estu nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por OKR-enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur la manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.**

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGOJ POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:
**Kasisto de ILEI:** B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:
**UEA,** Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĉk 37 89 64. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: **ilek-a**. Se rilatas al *Juna amiko*, uzu konton **juna-l**. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri via enpago. Membreco 1994: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.
**Hungara ILEI-sekcio:** (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj (300 HUF) de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo. Konto: OTP Budapest XXII ker, fiók 546-006891-8.